

*Revuo*  
**ESPERANTO**  
*Internacia*


---

---

N-RO 542 (1) JANUARO 1951

---

---



*Tra Marokaj Urboj (vidu p. 7)*

# Noto de la Eldonejo

44a Jaro

Januaro 1951

N-ro 542 (1)

**J**EN la unua numero de *Esperanto* en la nova formato kaj kun nova enhavo. La redaktoroj kaj la administracio klopodas doni al vi modernstilan revuon kun prezento kaj karaktero, kiuj espereble plaĉos al ĉiu. La celo estas ne nur doni esencan kaj interesan informon pri la Esperanto-movado, sed krome disponigi al la samideanaro revuon kun universala allogo.

Tiucele ni konstante serĉas artikolojn el ĉiuj partoj de la mondo. Nia revuo estu spegulo de la homaro! Ni jam posedas kvanton da interesa materialo, kiu sufiĉos por kelkaj numeroj, sed ni bezonas vian aktivan kunlaboron. Ni precipe bonvenigas artikolojn kultur-klerigajn kaj artajn, prefere kun bildoj.

Tamen, precipe en la nuna tempo de plialtigantaj prezoj, ni povos tiel daŭrigi nian politikon en tiu rilato, nur se la abonantaro estos sufiĉe granda. Por varbi la intereson de geesperantistoj ni sendas specimenon de ĉi tiu numero al centoj da malnovaj anoj kaj al aliaj. Ni tre esperas, ke la enhavo kontentigos ilin, kaj ke ili volos aliĝi al nia Asocio pere de niaj Perantoj en la respektivaj landoj, aŭ senpere ĉe U.E.A.

Se nia revuo plaĉos al vi, aliĝu. Se ĝi ne plaĉos al vi, transdonu ĝin al eventuala interesato. Antaŭdankon. Ni petas niajn lojalajn legantojn kaj membrojn varbi inter siaj konatoj. Ju pli grandnombra la abonantaro, des pli bona estos la revuo. Ni projektas regule eldoni la gazeton kun 32 paĝoj kun bildoj kaj interesa enhavo. Per viaj aktiva subteno kaj agado vi helpos al ni materie kaj morale je plenumo de tiu nia plano.

Oficiala organo de  
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al  
ESPERANTO  
Palais Wilson, Genève, Svis.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj, anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,  
Anglujo

Jara abono : 8 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 12ŝ. 6p.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

## Tarifo por reklamoj :

|                            |                            |
|----------------------------|----------------------------|
| 1 paĝo £6                  | $\frac{1}{2}$ paĝo £3      |
| $\frac{1}{4}$ paĝo 30 ŝil. | $\frac{1}{8}$ paĝo 15 ŝil. |

## Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 74 landoj



# ESPERANTO

## 1951

44a Jaro

*Redaktoro :* HANS JAKOB

*Helpredaktoro :* MASON STUTTARD

### UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

*Administracio :*

HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO

*Serva Oficejo :*

PALAIS WILSON, GENÈVE, SVISLANDO

# I N D E K S O

|                                                                                                   | paĝo         |
|---------------------------------------------------------------------------------------------------|--------------|
| Abisenujo en la tutan mondan, De .. .. .                                                          | 197          |
| Alaska Stafeto, La : <i>F. Omelka</i> 25, 57, 91, 123, 151, 186, 213, 235, 261, 283, 311          | 311          |
| Alfabeto de la Reĝo : <i>D-ro A. Metraux</i> .. .. .                                              | 156          |
| Arkeologia Tendaro : <i>J. Vesterland-Andersen</i> .. .. .                                        | 271          |
| Atoma Bombo, La : <i>C.J.C.</i> .. .. .                                                           | 111          |
| Aŭtuna Grimaco : <i>Julio Baghy</i> .. .. .                                                       | 290          |
| Bilderoj el Kvar Landoj : <i>D-ro I. Lapenna</i>                                                  | 171          |
| Bremenaj Urbmuzikantoj : <i>G. Milanowski</i>                                                     | 85           |
| Bretona Ceramiko, La : <i>Ch. Le Seac'h</i> ..                                                    | 69           |
| Christaller, Paul : <i>H. Jakob</i> .. .. .                                                       | 75           |
| Ĉefartikoloj .. .. . 1, 33, 65, 129, 161, 193, 241, 265, 289                                      | 289          |
| 15-a de decembro : <i>H. Jakob</i> .. .. .                                                        | 289          |
| Distro, Por via .. .. . 21, 55, 87, 119, 182, 278                                                 | 278          |
| Domkonstruado : <i>R. E. Fairbairn</i> .. .. .                                                    | 18           |
| Donu al mi tempon : <i>Brendon Clark</i> .. .. .                                                  | 139          |
| En Stokholmo : <i>D-ro P. Kempeneers</i>                                                          | 316          |
| Etimologia Demando : <i>B. Gerdman</i>                                                            | 90           |
| Felietono : v. Alaska Stafeto                                                                     |              |
| Fianĉiĝoj .. .. . 46, 144                                                                         | 46, 144      |
| Formovo de Antikva Vinkelo : <i>Mason Stuttard</i> .. .. .                                        | 12           |
| Forumo, Nia .. .. . 89, 110, 145, 180, 286                                                        | 286          |
| Geedziĝoj .. .. . 46, 128, 144, 192, 215, 239, 282, 309                                           | 309          |
| Haarlem—Kunvenloko de T.J.O. .. .. . 62, 189, 243                                                 | 243          |
| Himno de l'Eŭropa Junularo .. .. . 11                                                             | 11           |
| Informilo Oficiala .. .. . 31, 63, 95, 127, 159, 191, 216, 240, 264, 288, 315                     | 315          |
| Interpopola Mondparlamento : <i>D-ro E. Privat</i> .. .. .                                        | 42           |
| Jakob, Hans—60-jarulo : <i>E. Malmgren</i> .. .. .                                                | 309          |
| Jura signifo de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj :<br><i>D-ro Ivo Lapenna</i> .. .. . | 305          |
| Kafo el Abisenujo .. .. .                                                                         | 197          |
| Kanado, En : <i>R. E. Fairbairn</i> .. .. .                                                       | 43           |
| Kanario Insularo, El la : <i>J. Régulo Pérez</i> .. .. .                                          | 39           |
| Kiel sukcesi .. .. .                                                                              | 211          |
| Kio estas via V.-K. ? .. .. . 30, 55, 87, 119, 182, 212, 278                                      | 278          |
| Kiu venis la unua—la kokino aŭ la ovo ? <i>A. C. Oliver</i> .. .. .                               | 33           |
| Kongresoj kaj Kunvenoj (ne-naciaj) :                                                              |              |
| Fervojistoj .. .. . 3                                                                             | 3            |
| Helsingør Ferio .. .. . 99, 244                                                                   | 99, 244      |
| I.K.U.E. .. .. . 50, 76, 243                                                                      | 50, 76, 243  |
| Instruistoj .. .. . 100, 246                                                                      | 100, 246     |
| 36-a Universala .. .. . 10, 65, 76, 121, 131, 184, 194, 217, 255                                  | 255          |
| 37-a Universala .. .. . 247, Okt. kovrilo, 308                                                    | 308          |
| Kongreslokoj, Estontaj : <i>H. Jakob</i> .. .. .                                                  | 133          |
| Konstanz Ferio .. .. . 79, 185, 245                                                               | 79, 185, 245 |
| S.A.T. .. .. . 4, 244, 264                                                                        | 4, 244, 264  |
| Soesterberg Ferio .. .. . 94, 246                                                                 | 94, 246      |
| T.J.O. .. .. . 62, 189, 243                                                                       | 62, 189, 243 |



|                                                                                                                                        | paĝo                                           |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------------------------------------------------|
| Konkursoj :                                                                                                                            |                                                |
| Belarta .. .. .                                                                                                                        | 155, 226, 258                                  |
| Enigma : <i>P. H. Mooy</i> 20, 52, 84, 116, 147, 179, 207, 234, 254, 281, 310                                                          |                                                |
| Internacia .. .. .                                                                                                                     | 62, 86, 118, 160, 192, 212, 234, 242, 266, 292 |
| Oratora .. .. .                                                                                                                        | 131, 227                                       |
| Kunlaborantoj, Niaj :                                                                                                                  |                                                |
| Delfi Dalmau .. .. .                                                                                                                   | 83                                             |
| Einar Adamson .. .. .                                                                                                                  | 115                                            |
| J. Saldanha Carreira .. .. .                                                                                                           | 149                                            |
| Jean Guillaume .. .. .                                                                                                                 | 162                                            |
| Ragnvald Rian .. .. .                                                                                                                  | 249                                            |
| Laurids Jakobsen .. .. .                                                                                                               | 272                                            |
| Oscar Bünemann .. .. .                                                                                                                 | 302                                            |
| Literoj, Pri la nomoj de : <i>G. Waringhien</i> .. .. .                                                                                | 22                                             |
| Manĝado kaj la Sano, La : <i>J. W. Leslie</i> .. .. .                                                                                  | 273, 301                                       |
| Maorioj, La : <i>Y. M. Canty</i> .. .. .                                                                                               | 137                                            |
| Maorioj, La Vojaĝo de la : <i>Brendon Clark</i> .. .. .                                                                                | 140                                            |
| Marokaj Urboj, Tra : <i>L. Apcher</i> .. .. .                                                                                          | 7                                              |
| Memoraĵo je la patro de l'higieno : <i>G. Agricola</i> .. .. .                                                                         | 97                                             |
| Memorigo pri ne-ekzistinto : <i>F. Hayotte</i> .. .. .                                                                                 | 201, 288                                       |
| Monata Letero .. .. .                                                                                                                  | 170, 200                                       |
| Montgrimpado en Sud-Ameriko : <i>T. Sekelj</i> .. .. .                                                                                 | 101                                            |
| Mortintoj, Niaj .. 32, 46, 75, 96, 128, 158, 192, 215, 239, 258, 282, 309                                                              |                                                |
| Naskiĝoj .. .. .                                                                                                                       | 46, 144, 215, 239, 258, 282                    |
| Novulo, La : <i>A. D. Foote</i> .. .. .                                                                                                | 237                                            |
| Oficejo, El la .. .. .                                                                                                                 | ..Feb., Marta kovriloj, 111                    |
| Omaĝo pere de la veteranoj : <i>Carl Barthel, Oscar Bünemann, Margrethe Noll, Paul Nylén, Edmond Privat, R. Sakowicz</i> .. .. .       | 293                                            |
| Panteono, La .. .. .                                                                                                                   | 68, 193, 250                                   |
| Pickwick en Ipswich, S-ro : <i>C. Dickens</i> .. .. .                                                                                  | 117                                            |
| Poezio .. .. .                                                                                                                         | 111, 139, 140, 162, 237, 290                   |
| Post Kvar Jaroj : <i>V. C. Nixon</i> .. .. .                                                                                           | 269                                            |
| Prelegvojaĝoj de D-ro Lapenna .. .. .                                                                                                  | 67, 134, 171                                   |
| Pretigu Vin ! <i>Karl Vanselow</i> .. .. .                                                                                             | 162                                            |
| Pripensoj postkongresaj : <i>H. Jakob</i> .. .. .                                                                                      | 259                                            |
| Propaganda Fakoj, Rekomendoj de .. .. .                                                                                                | 232                                            |
| Propagando, Nekontentiga stato de : <i>D-ro I. Lapenna</i> .. .. .                                                                     | 37                                             |
| Radio : <i>G. Larglantier</i> 3, 24, 35, 36, 56, 67, 68, 88, 120, 136, 150, 164, 166, 183, 208, 234, 238, 263, 287, 291, 292, 314, 316 |                                                |
| Raportoj pri :                                                                                                                         |                                                |
| Aviado .. .. .                                                                                                                         | 266                                            |
| Instruistoj .. .. .                                                                                                                    | 135, 269                                       |
| Int. Amikeca Ligo .. .. .                                                                                                              | 279                                            |
| Junulgastejoj .. .. .                                                                                                                  | 166                                            |
| Komerca Servo .. .. .                                                                                                                  | 136                                            |
| Kooperativismo .. .. .                                                                                                                 | 166, 253                                       |
| Mondfederalistoj .. .. .                                                                                                               | 166                                            |
| Poŝtmark-kolektantoj .. .. .                                                                                                           | 30                                             |
| Stenografio .. .. .                                                                                                                    | 166, 258                                       |
| U.N. : UNESKO .. .. .                                                                                                                  | 4, 34, 94                                      |
| Redaktado, Konsideroj pri : <i>Mason Stuttard</i> .. .. .                                                                              | 72                                             |
| Redaktoro al la Leganto .. .. .                                                                                                        | 2                                              |
| Reklamoj .. .. .                                                                                                                       | 2                                              |
| Rimarkoj pri pralingvo : <i>L. Laurat</i> .. .. .                                                                                      | 209                                            |
| Savado de Infanoj : <i>M. Otiel</i> .. .. .                                                                                            | 47                                             |
| Serur-muzeo : <i>D-ro Fentsch</i> .. .. .                                                                                              | 106                                            |
| Socia Sekureco en Britujo : <i>F. Parker</i> .. .. .                                                                                   | 53                                             |

|                                                           | paĝo                                          |
|-----------------------------------------------------------|-----------------------------------------------|
| Spertoj de Interlingisto : <i>W. Henthorne</i> .. .. .    | 78                                            |
| Telepatio Eksperimenta : <i>K. Wilgenhof</i> .. .. .      | 73                                            |
| Tra la Libraro .. .. .                                    | 16, 48, 80, 112, 143, 176, 204, 252, 276, 300 |
| Tra la Mondo Esperantista :                               |                                               |
| Andoro .. .. .                                            | 163, 233                                      |
| Argentino .. .. .                                         | 163, 291                                      |
| Aŭstralio .. .. .                                         | 233                                           |
| Aŭstrujo .. .. .                                          | 3, 35, 67, 163, 246, 267, 291                 |
| Belgujo .. .. .                                           | 94, 135, 195                                  |
| Brazilo .. .. .                                           | 67, 195, 267, 291                             |
| Britujo .. .. .                                           | 35, 99, 135, 163, 195                         |
| Bulgarujo .. .. .                                         | 67                                            |
| Ĉeĥoslovakujo .. .. .                                     | 130                                           |
| Ĉinujo .. .. .                                            | 3                                             |
| Danlando .. .. .                                          | 99, 135, 233, 244, 271, 291                   |
| Francujo .. .. .                                          | 3, 67, 99, 163, 195, 233, 246                 |
| Germanujo .. .. .                                         | 4, 100, 164, 196, 243, 245, 246, 291          |
| Gvatemalo .. .. .                                         | 164, 291                                      |
| Hispanujo .. .. .                                         | 4, 196, 233, 292                              |
| Italujo .. .. .                                           | 4, 35, 68, 196, 233, 267, 292                 |
| Izraelo .. .. .                                           | 100, 233                                      |
| Japanujo .. .. .                                          | 36, 234                                       |
| Jugoslavujo .. .. .                                       | 164, 234                                      |
| Kanariaj Insuloj .. .. .                                  | 164                                           |
| Maroko .. .. .                                            | 36                                            |
| Meksikio .. .. .                                          | 196                                           |
| Nederlando .. .. .                                        | 4, 68, 135, 196, 243, 246, 292                |
| Nikaragvo .. .. .                                         | 267                                           |
| Norvegujo .. .. .                                         | 36, 136, 196, 247                             |
| Novzelando .. .. .                                        | 100, 234, 292                                 |
| Pollando .. .. .                                          | 165                                           |
| Portugalujo .. .. .                                       | 132, 149, 268                                 |
| Sarlando .. .. .                                          | 155, 196, 292                                 |
| Skotlando .. .. .                                         | 99                                            |
| Svedlando .. .. .                                         | 4, 136                                        |
| Svislando .. .. .                                         | 165                                           |
| Urugvajo .. .. .                                          | 36                                            |
| Usono .. .. .                                             | 234                                           |
| Tropika Fulmotondro : <i>Erika Linz</i> .. .. .           | 303                                           |
| Turismo .. .. .                                           | 211, 292                                      |
| U.E.A. : v. Informilo Oficiala                            |                                               |
| Universalismaj Tendencoj : <i>D-ro I. Lapenna</i> .. .. . | 5                                             |
| Urbo kun Granda Koro : <i>J. H. Rosbach</i> .. .. .       | 247                                           |
| Valora Eksperimento : <i>C. C. Goldsmith</i> .. .. .      | 279                                           |
| Veteranoj : <i>M. Lewin</i> .. .. .                       | 194, 299                                      |
| Vinoj de Bordeaux, La : <i>P. Marly</i> .. .. .           | 167                                           |
| Vivo Virina : <i>S-ino R. M. Dhonau</i> .. .. .           | 15, 45, 77, 109, 175, 203, 251                |

# Ce la Sojlo de la Nova Jaro

**K**UN granda bedaŭro ni sciigis pri malsano de la Prezidanto de U.E.A. S-ro Malmgren. Ĉiuj scias kiun grandan laboron li efektivigis por nia Asocio dum multaj jaroj kaj ni ĉiuj esperas, ke li baldaŭ povos, kiel antaŭe, gvidi nian asocion dum la nuna malfacila tempo.

De pluraj samideanoj ni jam ricevis bondezirojn al li. Kun danko al la sendintoj ni havigis ilin al la Prezidanto kun niaj personaj bondeziroj.

\* \* \*

Kiel Vic-Prezidanto, mi havas la taskon alporti al la membraro amikan novjaran saluton.

La jaro 1950 finiĝis en maltrankvilaj cirkonstancoj. Ni tamen esperas, ke la saĝeco de la politikaj gvidantoj konsideros la grandan deziron de la popoloj pri paco, deziro kiu interalie montriĝas per la ĉiam pli granda sukceso de niaj klopodoj favore al Esperanto.

Antaŭ 50 jaroj, en la jaro 1901, Generalo Sebert kaj Charles Méray prezentis memorandumon pri Esperanto al la franca Akademio de Sciencoj. Tio estis, praktike, la komenco de la tiel nomata "franca periodo" de nia movado. Je tiu momento Esperanto estis apenaŭ konata. Al multaj personoj ĝi aspektis kiel strangaĵo, inda okupi nur duonfrenezulojn.

Nuntempe, malgraŭ ĉiuj batoj, Esperanto estas io vivanta, kiu ĝuas, se ne la aprobon, almenaŭ la rekonon de la plej granda parto de la homaro.

Tio devas inciti nin, ankoraŭ dum la jaro 1951, streĉi ĉiujn niajn fortojn por atingi novajn praktikajn sukcesojn.

\* \* \*

Dum la lastaj jaroj aŭdiĝis kelkaj kritikoj pri nia gazeto *Esperanto*. La Estraro faris enketon, pristudis la kritikojn kaj sugestojn dum la Paska kunsido, kaj alprenis kelkajn decidojn.

La lastaj kajeroj jam montris ŝanĝojn kiujn certe rimarkis kaj aprobis la plimulto de niaj membroj. Nun venas nova paŝo. La grandeco de la gazeto estas ŝanĝita. Tiun novan formaton, similan al tiu de la tutmonde konataj "Digest", multaj opiniis pli moderna kaj pli taŭga.


La uzebla spaco estos pli granda. La kajeroj estos pli dikaj, aspektos pli imponaj antaŭ la eksterstarantoj, la disponebla loko estos pli facile dividebla. Krome la bindigo—pli malmulte-

kosta en tiu formato—havigos ĉiujare belan volumon, proksimume 350-paĝan, kun multaj ilustraĵoj, kiu bele pliriĉigos la bibliotekon de la membroj.

\* \* \*

Al ĉiuj Esperantistoj, disigitaj sur la tuta terglobo, iras niaj novjaraj salutoj kaj bondeziroj. Por multaj el ili la poresperanta laboro estas malobligata pro diversaj kaŭzoj. Ni esperas, ke tre baldaŭ novaj cirkonstancoj permesos al ili repreni sian lokon en nia samideana amikaro, kiu iam kovros la tutan terglobon.

*P. Kempeneers.*





# La Redaktoro

## al la legantaro

SEKVANTE la deziron de multaj legantoj, la Komitato de U.E.A. sankciis la proponon de la Estraro pri la nova formato. Diversaj kialoj parolis favore pri tiu ĉi ŝanĝo kaj ili estis montritaj en eltrakta artikolo en la februara eldono. Ni dankas tie ĉi ankoraŭfoje al la bonvolaj respondintoj, el kiuj kelkaj detale kaj serioze donis siajn opiniojn.

Se la ekstera aspekto, la formo, ŝanĝiĝas, la redaktoroj klopodas adapti la enhavon al nunaj deziroj. Ni jam diris, ke revuo de *movado* kun neŭtral-sendependa karaktero estas iel limigita en la elekto de materialo. Aliflanke, ĝi devas doni sufiĉan spacon al la organizaj-administraciaj aferoj, kio ne ĉiam konvenas al iuj (precipe kiam oni petas ion!). Plia ĝeno por la redaktoro estas la *spaco* disponebla, ne ĉiam harmoniigebla laŭ la materialo kaj laŭ oportuneco. Ĉi tiuj kondiĉoj iafoje kreas malbonhumoron ĉe iuj legantoj, kiuj ne memoras, ke estas ankaŭ aliaj legantoj kun same legitimaj deziroj.

Por ke ni povu doni plejeble diversan materialon, necesas ke ni severe atentu informojn sendatajn de niaj aktivaj samideanoj. Lok aokazaĵo Esperantista certe povas esti grava kaj citinda afero. Sed tio rilatas la lokon mem kaj kvin linioj en internacia revuo sufiĉas. Sekve mallongigu viajn tekstojn, uzu ekonomie la adjektivojn (nia *bela* lingvo, nia *glora* afero, nia *sankta* idealo, ĉio tio foje bone sonas, sed ripetite ĝi enuas kiel modkuranta kanto!), rakontu koncize *faktojn*. Alia ĉapitro estas la alvokoj, kiujn ni devas malakcepti se ili ne

havas ĝeneralinteresan celon. Ankaŭ en tiu ĉi rilato oni devas kaj povas *ŝpari* je vortoj kaj sekve je spaco. Redaktante jam de la jaro 1914, la redaktoro de *Esperanto* konstatis, kiom malmulte da samideanoj, lingve spertaj, scias redakti informojn destinitajn por gazeto. (Parenteze, ankaŭ ne-esperantistoj skribantaj ion por periodaĵo kaj eĉ regule, montras sin malkapablaj esti koncizaj).

Nia revuo nun eniras sian 44-an jaron de ekzisto. Plurfoje ĝi ŝanĝis la veston, sed ĉiam ĝi sekvis la gvidliniojn de la fondinto H. Hodler, esti parolilo por la alta idealo de la Esperantismo kaj stari super la ĉiutagaj oportunaĵoj kaj okazaĵoj. Niaj ĉiamaj gvidlinioj troviĝas en la respekto al la *Fundamento de Esperanto* kaj al la Statuto de nia Asocio.

*Hans Jakob.*

---

### Helpu !

Legantoj povas kontribui al la evoluo de sia organo per akiro de reklamoj de privataj firmoj. Grava kaj atentinda faktoro estas tio, ke nia revuo **ĉirkulas en 74 landoj** kun meza eldonnombro — krom por specialaj eldonoj — de 6,000.

En multaj landoj oni ankoraŭ ne povas fari la necesajn transpagojn kaj tial multaj samideanoj restas ekster nia verda familio. Per simpla "adopto" de tia samideano vi povos fari grandan servon kaj ĝojon al Esperantisto ie en la mondo. Faru la pagon al via kutima pagejo. Montru la solidaron de nia afero al niaj malplibonŝancaj kolegoj !



# ***Tra la Mondo Esperantista***



## **Aŭstrujo**

*Esperanto en Instruista Seminario :* Kurso komenciĝis 3 nov. 1950 en la Instruista Seminario de Innsbruck. Tiu informo estas precipe grava, ĉar temas pri la unua instruista seminario en Aŭstrujo, kiu tiel rekonas la Internacian Lingvon. La instruado estas libervola kaj okazas vespere, sed tamen ĝuas oficialan apogon. La atingi estas sekvo de la simpatia varbado de D-ro Wilhelm Baldauf, profesoro en la seminario.

*Popollernejo Kirchbichl :* Post la iniciato antaŭ du jaroj flanke de ĉi tiu lernejo, oni denove en la nuna jaro instruas Esperanton al la geknaboj. La gepatroj subskribis deklaron postulantantan la devigan instruon de Esperanto.

*Metia lernejo, Innsbruck :* Oni komencis instruadon de Esperanto en metia lernejo por metallaboristoj de Innsbruck (Berufsschule für metallgewerbe).

*Konata artisto gvidas kurson :* En Bregenz konata radio- kaj artkantisto Heinrich Lorenz (artnomo Lorenz Oktavius) gvidas kurson de Esperanto en Bregenz. En novembro li prezentis Esperanto-kantojn en Radio-Dornbirn.

## **Ĉinujo**

*Starigo de Ligo :* Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 77, Peking, Ĉinujo, sciigas, ke la 7an de februaro 1951 okazos la oficiala fondiĝo de tiu Ligo. Samtempe okazos grandioza ekspozicio kun simpatia apogo de la

nuna reĝimo. Oni invitas saluleterojn kaj utilan materialon por fari imponan impreson ĉe la publiko.

## **Francujo**

*Esperanto-fako en Biblioteko :* En Parizo en la ŝtata Pedagogia Muzeo, 29 rue Ulm, Paris 5, la biblioteko por edukistoj enhavas multajn Esperantajn librojn, plejparte donacitajn de S-ro Rousseau en 1947. La *Esperanta Katalogo* indikas multajn dokumentojn diversajn, kolektojn de revuoj, originalajn kaj tradukitajn verkojn. Francaj edukistoj povas ricevi ilin senpere aŭ perpoŝte sen pago. Ankaŭ fremdaj instruistoj kaj profesoroj loĝantaj en Francujo rajtas ilin prunti kondiĉe ke ili prezentu al la Bibliotekisto "ateston pri instruista profesio" faritan ĉe la Ambasadorejo aŭ Konsulejo. La Biblioteko estas fermita ĉiusabate kaj inter 1 aŭg. kaj 15 sept.

*Kongreso de fervojistoj :* La 3-a Kongreso de I.F.E.F. okazos en Parizo en majo 16-20, 1951. Informojn ĉe: L.K.K. Franca Fervojista Esperanto-Asocio, 11 rue de Milan, Paris 9.

*Radio-amatoroj :* Kontaktoj ĵus okazis por vivantigi la sekcion de la Universala Klubo de Radio-Esperantistoj (U.K.R.E.) sub prezido de S-ro L. Frohn (DL 3 PK), kaj kunlaboro de S-ro W. Farrar (G 3 ESP) kaj S-ro Sly (Britujo) kaj S-ro R. T. Arnold (Usono). Radio-amatoroj sin anoncu al U.K.R.E., 46 rue Lamartine, Paris 9, Francujo.



## Germanujo

*Stenografia sukceso* : En ĝenerala konkurso stenografia en Flensburg partoprenis samideano Klaus Schlüter, junulo. Krom germanlingva tasko (240 silaboj en minuto) li partoprenis ankaŭ en Esperanta tasko atingante 140 silabojn en minuto. Tio verŝajne estas la unua oficiala Esperant-stenografia provo en Germanujo. Lian taskon oni subskribis "tre bone".

*Operkantisto-Esperantisto* : Dum speciala solenaĵo en la kadro de propaganda kunveno en Hannover, kantis konata koncert- kaj operkantisto Otto Fuchs en Esperanto. S-ro Fuchs estas FD de U.E.A. en Hannover kaj estas vaste konata kiel unuaranga artisto. Partoprenis la aranĝon D-ro Siegfried Ziegler, prez. de G.E.A. kaj S-ro O. T. Nicolaisen. Bela kaj arta muzika programo allogis grandan atenton ĉe la publiko.

## Hispanujo

La unuan fojon dum 14 jaroj oni organizas Esperantan kurson en Madrid. Tio estas bona aŭguro kaj montras revekiĝantan intereson por nia afero.

## Italujo

Sekve de la demandoj faritaj pri instruado de Esperanto, antaŭ kelkaj monatoj en la itala parlamento, la koncerna ministro respondis al la Itala Esperanto-Federacio jene : "La novaj programoj de instruado ne estas jam fiksitaj de la Komisiono por la Reformo de la Lernejo. Tamen estas notinde, ke per la nuna reformo la institutoj estos rajtigitaj aranĝi ankaŭ nedevigajn kursojn, inter kiuj povos esti la instruado de Esperanto. En ĉiu okazo la decido pri tio estos la kompetenteco de la lokaj lernejaj aŭtoritatoj."

## Nederlando

*Esperanto en Universitato* : La konata Esperanto-instruisto Sigismundo Pragano el Bukureŝto, Rumanujo, ĵus ricevis de la urbestro de la nederlanda ĉefurbo Amsterdam la oficon de docento de la lingvoj rumana kaj Esperanta ĉe la Komunuma Universitato de Amsterdam, kiel asistanto de D-ro M. Valkhoff, profesoro de la romanaj lingvoj. S-ro Pragano komencis sian universitatan kurson la 15 nov. 1950.

*Sukceso de infano* : Dekunujara knabineto Henneke Nelson, v. Slingelandtlaan 30, Dordrecht, akiris en ekzameno 4 nov. 1950 Esperanto-diplomon A (lingvokapablo). Ŝi verŝajne estas la plej juna diplomito en Nederlando (ĉu en la mondo?).

*Grupo ĉe Philips* : Fondiĝis en Eindhoven la "Philips Esperanto-Klubo" (P.E.K.). Kelkaj oficistoj de tiu mondfama entrepreno de radio iniciatis la klubon kun celo disvastigi Esperanton inter la multaj Philips-personaroj tra la mondo. Komencis kun 50 membroj.

## Svedlando

*Kongreso de S.A.T.* La kongreso de S.A.T. okazos en Stockholm 28 julio-3 aŭg. 1951. Informoj ĉe : K-do Yngve Nilson, Förvaltarvägen 20, Enskede, Svedlando.

## UN

En letero de la 25 okt. 1950, direktita al la sekretario de la TJO-Kunveno en Konstanz, La Unuiĝintaj Nacioj en Lake Success konfirmas kun danko la ricevon de pacdeklaro subskribita la 3an aŭg. de la 430 partoprenintoj en la Internacia Junulara Kunveno en Konstanz. En sia letero UN diras, ke la deklaron transprenis UNESKO por prilaboro.



Prof. D-ro Ivo Lapenna :

# Esperanto kaj la Universalismaj Tendencoj

*El la festparolado ĉe la Solena Malfermo de la 35-a Universala Kongreso de Esperanto*

En la *Aldono* al la ĵus aperinta *Retoriko* de Prof. Lapenna troviĝas la kompleta teksto de la parolado, kiun li eldiris ĉe la Solena Malfermo de la Pariza Kongreso. Ne povante, pro troa longeco, publikigi en nia gazeto la tutan paroladon, ni represas nur la du ĉefajn partojn.

En la enkonduko la oratoro omaĝis al la lando, al la urbo kaj al la universitato, kiuj gastigis la Kongreson. Farinte komparon inter la situacio en 1905 kaj hodiaŭ, li akcentis, ke malgraŭ ĉiuj teruraĵoj de la du mondmilitoj, la esperantistoj povas kun fiero ripeti la faman penson de D-ro Zamenhof, eldiritan ĉe la Bulonja Kongreso, ke ili sentas sin kaj estas unue kaj antaŭ ĉio homoj. Prof. Lapenna daŭrigis :

Ĉu vere estas tiel, aŭ, eble, tiu nia aserto estas naive-mensoga, senenhava frazo, kontraŭa al plej evidenta realaĵo, kiun nur ni—blindigitaj de la flama ardo por granda celo, enlulitaj en sorĉan dormon pro la milde-dolĉaj sonoj de supernacia komunikilo—utopiisme volas nek vidi nek aŭdi ?

Ĉu estas eble, ke areto da personoj pensu, sentu kaj agu universale home en mondo distranĉita kaj krucumita, en mondo disŝirita de sennombraj antagonismoj, en mondo sangon sanganta el miloj da vundoj ?

Aŭ, eble, ĉi tie okazas ia miraklo ?  
Nek unu nek la alia !

Ni ne estas iaj ekstersociaj estuloj, iaj revantaj fantaziuloj, kiuj naĝante ie en nuboj forgesas la teron, nek ni estas iaj strutoj, kiuj enŝovinte la kapon en la sablon, opinias ke ĉio estas en ordo ! Ni bone vidas la realaĵon, sed ni ankaŭ komprenas ke en la hodiaŭo ĉiuj ĉi ekonomiaj, sociaj, politikaj kaj ideaj kontraŭaĵoj havas du ĝeneralajn trajtojn kaj manifestas du esence kontraŭajn

tendencojn sur ĉiuj kampoj : unuflanke troviĝas la tendenco al universalismo kaj aliflanke la tendenco al egoisma regionismo.

La konstanta progresado de universalismo, spite al artefaritaj baroj kaj malhelpoj, estas senduba fakto. Sur la ekonomia kampo ĝi esprimiĝas per ĉiam pli forta interdependeco de la diversaj mondopartoj. Sur politika kampo ĝi montriĝas en la klopodoj formi superŝtatajn organismojn, kia estis la Societo de Nacioj kaj kia estas hodiaŭ la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj. Sur kampo idea, la scienco kaj arto, kiuj ĝis antaŭ nelonge estis apartenaĵo de fermitaj rondoj, celas direktiĝi ĉiam pli al la tuta homaro. Eĉ la lastaj grandaj militoj—tiuj plej krimaj atakoj kontraŭ la homeco, tiuj monstroj, detruantaj la tut-homaran solidarecon—estas, tamen, samtempe pruvoj pri la universaleco de la mondo. La fakto mem, ke la militoj devis ĝeneraliĝi, ke ili ne povis resti limigitaj nur al kelkaj terpartoj, montras klare, ke la mondo—vole nevole—havas radikajn komunajn interesojn ; sangado de unu parteto sangigas la tutan homaron, prospero en unu parteto prosperigas la tuton !

Kontraŭ tiu ĉi normala marŝado de la homaro al unueco, leviĝas la malnovaj kaj maljuniĝintaj, sed ankoraŭ tre fortaj, venenige mordantaj potencoj de mallumo kaj malprogreso. Sur kampo ekonomia : la lastaj provoj de memsufiĉa aŭtarkio ; sur kampo politika : naciismo kaj diktatoreco ; sur kampo idea : ekskluziveco de la nacia kulturo kaj penadoj

altrudi ĝin kaj sian propran nacian lingvon al la aliaj !

Giganta estas tiu lukto inter la putriĝantaj restaĵoj de la pasinteco kaj la brilantaj perspektivoj de la estonteco, lukto en kiu estas mobilizitaj ĉiuj fizikaj kaj moralaj fortoj, kaj kies atestantoj kaj partoprenantoj estas ankaŭ ni !

Malfacile, peze, la universalismo traboras al si la vojon tra marĉoj, nebuloj kaj tempestoj, inter fajro kaj glacio, sub insidoj kaj obstakloj al la ore sunumitaj pintoj de ekonomia bonstato, al la lazuraj serenoj de socia justeco kaj libereco ! Sed nehaltigeble, venke ĝi marŝas antaŭen.

Estis Kant, kiu diris, ke ekzistas postuloj de la racio kaj postuloj de la historio. Estu al mi permesite iom ŝanĝi la penson de Kant kaj diri : la universalismo estas postulo racia, ĉar ĝi estas postulo de la historia evoluo de la homaro, kiu—kondiĉite de la teknika progresado—iras de diverseco kaj pluraleco al konkordo kaj unueco.

La homaro fariĝas konscia pri si mem ! Ĉiam pli kaj pli !

\* \* \*

Kia estas la pozicio de la Esperantismo en tia situacio ?

La ideo pri Internacia Lingvo estas esprimo de universalismaj tendencoj. La realigo de tiu ideo en formo de nia Esperanto estas la plej konkreta, preskaŭ fizike palpebla manifestiĝo de tiu celado al tuthomeco. Sed, samtempe, ĝi estas ankaŭ la plej forta apogilo, la plej potenca antaŭeniganto de tiu sama universalismo, kiu ĝin kreis.

La lingvo—tute egale kiu, la lingvo ĝenerale—estas socia fenomeno, kiu troviĝas en funkcia rilato kun la bazo, el kiu ĝi elkreskis. La lingvo ebligas ne nur la pensadon kaj la reciprokan

komunikadon de ideoj, sed ĝi ankaŭ kreas certan senton de komuneco inter la personoj, kiuj ĝin uzas. Naskita de la socio, ĝi mem cementigas la socion, ŝirmante ĝin de disfalo.

Tute same : la Internacia Lingvo ne estas sole teknika rimedo de pensado, nek pura peranto de penso-interŝanĝoj en internaciaj kadroj. Ĝi havas ankaŭ profundan idean signifon. Same kiel la naciaj lingvoj ludis kaj ludas unu el la ĉefaj roloj en la formiĝo de la nacioj, same tiel la Internacia Lingvo—neŭtrala, supernacia interkomprenilo—formas kaj stimulas la tuthoman, universalan solidarecon.

La uzado mem de la samaj vortoj proksimigas la homojn. Eĉ se Esperanto limiĝus nur al tio, ĝia rolo estus granda. Sed la Internacia Lingvo ebligante rektajn, senperajn kontaktojn tra la tuta mondo, klare evidentigas la esencan samecon de la homa naturo.

Multnombraj sciencaj verkoj estas skribitaj pri tiu temo. Diversaj religioj proklamis la principon kiel unu el la fundamentoj de la respektiva religia koncepto. La filozofio pri-diskutis la demandon ĉiufланke. Multe kaj ofte oni parolas pri ĝi. Tamen nur ni, la uzantoj de la Internacia Lingvo ne nur parolas pri tuthomara solidareco, ne nur mense ĝin komprenas, sed ankaŭ sentas ĝin. Ni konkrete sentas, ke ĉiuj homoj—sen ia ajn konsidero al la diferencoj rasaj, naciaj, lingvaj aŭ religiaj—estas kaj devas esti egalaj en sia kvalito de homoj. Tial ni ankaŭ sentas, ke devas malaperi ĉiu ajn formo de subpremado aŭ de superregado de unu popolo super la alia, ke devas malaperi ĉiuj privilegioj, bazitaj sur rasa, nacia, lingva aŭ religia apartenoj.

(daŭrigo sur p. 14)



L. Apcher :

## Tra Marokaj Urboj

**E**N Maroko ĉiuj iom gravaj urboj konsistas el duobla urbo: eŭropa kaj araba, ambaŭ nete apartigitaj.

La eŭropaj partoj tute similas eŭropajn urbojn. Nur unu diferenco: preskaŭ ĉiuj domoj havas terason anstataŭ tegmento, kaj tiuj tegmentoj ĝenerale estas el verdaj tegoloj. Krome la plej malnovaj konstruaĵoj neniam havas pli ol 30 aŭ 40 jarojn.

Kontraŭe, la arabaj partoj de la marokaj urboj estas tre malnovaj—la urbo Fez estas pli ol miljara—kaj ofte tute similaj. Nenio ŝanĝiĝis, nek la arkitekturo, nek la labormetodoj; nek la kutimoj, moroj, nek la vestoj de la loĝantaro.

Ilin ĉiam ĉirkaŭas remparo kun kelkaj pordegoj, kiuj estas la solaj enirejoj de la urbo. Rememoro pri la tempo, antaŭ longe pasinta, kiam ĉiama interna militado disŝiris Marokon. Ofte tiuj pordegoj estas masivaj, imponaj konstruaĵoj. Unu el ili, la fama pordego de Mansur en Meknès, estis konstruita de eŭropa sklavo, kiu islamiĝis, verŝajne por esti iom pli feliĉa . . . .

La stratoj estas fantazie zigzagaj, ege mallargaj, sed ne ĉie kun la sama largeco. Plejofte ili estas pavimitaj per rondaj mar-ŝtonetoj, la strat-defluiloj kuras laŭ la mezo de la strato. Trotuaroj ne ekzistas. Multaj stratetoj ne havas elirejon. Kelkaj estas tegmentitaj per kanoj por ŝirmi kontraŭ la suno. En tiaj stratoj estas tre malfacile orientiĝi.

La blanke kalkitaj konstruaĵoj ĝenerale estas nur ter- aŭ unu-etaĝaj, tre malofte pli altaj. La dompordoj estas ĉiam fermitaj, kaj maloftaj estas



*Allogo en la foiro : la serpentisto*

la fenestroj, kiuj rigardas al la strato. Kiam tiaj ekzistas ili ĉiam estas fortike enkadritaj. Neniam la pasanto povas vidi tion, kio okazas en araba domo. Tamen malantaŭ tiuj altaj nudaj muroj foje troviĝas veraj palacoj kun kolonoj el marmoro, ĉambregoj tute tegitaj per mozaiko, internaj ĝardenoj ĉiam verdaj kun plaŭdantaj ŝprucfontanoj.

Multaj stratoj estas tute silentaj kaj senhomaj. Tamen foje oni renkontas knabinon kun tabulo surkape; ŝi iras al la fornisto por baki la panon, kiun oni knedas hejme. Nur mizeruloj aĉetas panon ĉe la vendisto.



Alian fojon vi subite ekaŭdas psalman kanton. En nuda ĉambro, kaŭrante sur mato, ĉirkaŭante maljunulon, balancante sian korpon, dekduo da knaboj kun tabuleto sur la genuoj, laŭte lernas parkere ĉapitron de Korano. La flegma blankbarba instruisto, ŝajne ne aŭdas tiun bruegon.

Sed alia estas la afero, kiam temas pri komercaj stratoj. Ili ne estas pli largaj ol la ceteraj. La komercistoj grupiĝas laŭprofesie en la sama strato. Strato de ŝtofvendistoj, de babuŝfaristoj, de potistoj, de juvelistoj, de fruktovendistoj k.t.p.

Ĉiu domercisto loĝas en tre malgranda butikoj je nur 2 aŭ 3 kvadrataj metroj. La nivelo de la butikplanko estas proksimume duonmetron pli alta ol la nivelo de la strato. La posedanto por ĝin eniri devas sin helpi per rimeno pendanta de la pordosupro. Kompreneble la klientoj ne eniras la butikon; ili staras antaŭ ĝi sur la strato. Faldebla vendotablo baras la butikpordon.

En tiuj komercaj stratoj regas intensa vivo, svarmas multkolora homamaso, sed oni renkontas preskaŭ nur virojn, ĉar la virinoj devas resti hejme. Ĉiuj laŭtege interparoladas kaj marĉandas senfine, ĉar al la araboj, kiel al ĉiuj orientanoj, neniam ŝrĝas la tempo. Plie ili ne kutimas aĉeti je antaŭfiksita prezo.

La stratoj de la metiistoj estas ankoraŭ pli vidindaj ĉar tiuj manlaboristoj uzas antikvajn ilojn, eble la samajn, kiujn uzis niaj prapatroj dum la mezepoko. Jen potistoj, kiuj laboras super knarantaj turnilaĉoj, kiujn ili mem movas per piedoj; jen forĝistoj, kiuj uzas vere strangajn balgoblovilojn; lignaĵistoj, kiuj lerte gravuras cedran tableton per eksmoda

grifelo; juvelistoj, kiuj pesas oraĵojn per antikva pesilo kaj peziloj el metalgrajnoj; tapiŝistoj, kiuj vigle teksas belegajn multekolorajn tapiŝojn per nur du lignaj kadroj; tajloroj, kiuj ornamas vestojn per arĝentaj fadenoj, helpate de knaboj starantaj ekster la butikoj sur la strato. Ili tenas la ekstremojn de la du pasamentaj fadenoj kaj lerte interplektas ilin ĉiufoje kiam la mastro faris kelkajn kudrerojn, iajn desegnaĵojn sur la vesto.

Akra ekkrio: Atentu! igas vin turni vin. Kio okazas? Azenisto malfacile provas trabori vojon al sia azeno portanta duoblan korbon tra tiu densa amaso. Ĉiu algluiĝas al la muro por lasi ĝin pasi. Puŝoj, kolizietoj, koleraĵ blasfemoj. Tamen ne gravas. Pri tio oni jam kutimas.

Foje la strato largiĝas kaj fariĝas granda placo kun subĉiela foiro. Densa senorda amaso da tendoj kaj budoj el plej diversaj materialoj: sakoĵ, truitaj ondoladoj, tabuloj el malnovaj kestoj, rustintaj ladoj de benzinskatoloj . . . .

Jen serpentdresisto, kiu kun serpentego ĉirkaŭ la kolo, gestante rakontas strangajn historiojn ofte infanecajn, foje krudajn, sed ĉiam spritajn. Tiu analfabetulo majstre regas sian lingvon. Eĉ se vi ne komprenas la araban lingvon vi povos fari al vi ideon pri la rakonto nur rigardante la sunbruligitajn vizaĝojn, kiuj lin ĉirkaŭas: brilaj okuloj, streĉa atento, laŭta ridego . . . . Tamen la bronzaj soldoj ne falas hajle en la lignan teleron, kiun la rakontisto prezentas al sia aŭdantaro.

Kuprasona tintado harmonie sonas ĉe viaj oreloj. Estas akvovendisto kun felsako plena de akvo sur sia dorso, kaj li proponas al vi duonlitron



da freŝa akvo en brilega kupra taso, ĉar kafejoj ne ekzistas.

Jen maljuna skribisto kaŭranta malantaŭ eta tablo kun inkujo, paperaĉoj, pintigitaj kanpecoj, kiujn li uzas kiel plumingon. Certe li havas grandan klientaron ĉar multaj estas tiuj, kiuj scias nek skribi nek legi.

Sub tendaĉo razisto mirigas vin per siaj strangaj manovroj. Li eltiras sangon el la kap-malsupro de paciento pere de iu mezepoka aparato. Foira akrobato kun simio penas altiri vian atenton. Almozulo, ĉifone vestita blindulo, alvokas sur vin la benon de ĉiuj arabaj sanktuloj, petante de vi kelkajn monerojn.

La placo mallargiĝas kaj ree fariĝas strato. Belega malfermita pordo kun



*Supvendejo en la foiro*

mozaikaj arabaj skribaĵoj. Sed granda gravurita barilo el ligno malpermesas vidi internen. Araboj tien eniras, demetante siajn babuŝojn ĉe la enirejo. Tio estas unu el la multenombraj moskeoj de la urbo, la solaj monumentoj, ĉar la islama religio malpermesas reprodukti vivantajn estaĵojn. En la marokajn moskeojn neislamanoj ne rajtas eniri. Tamen vi povas aŭdi je la preĝhoru (kvin ĉiutage) la preĝanoncantojn, kiuj ĉiuj je la sama horo, supreniras la altan moskeo-turon por anonci al la fideluloj, ke tuj alvenos la horo preĝi. Kaj vespere, iom post la sunsubiro, kiam la urbo eksilentas, estas vere emocie aŭdi centojn da fortaj basaj voĉoj—ĉar por celebri Dion nenio estas pli bela ol la homa voĉo, diris la profeto Muhammed—voki el la blua ĉielo la islamanojn al la preĝo.

(Ni esprimas sinceran dankon al "Sochepresse" pro la afabla permeso reprodukti la fotojn.)



*Indiĝena akvovendisto*

**Ĉu vi jam pagis vian Kotizon  
por 1951?**

# 36-a Universala Kongreso de Esperanto

München 4-11 aŭg., 1951

## Informoj pri loĝejoj

En Munkeno troviĝas multaj bonaj hoteloj kaj restoracioj kiuj funkcias laŭ pactempa kutimo. Por havigi al la kongresanoj la plej bonan loĝadon, la Loka Kongresa Komitato transdonis la tutan aranĝon de ĉambroj en hoteloj, pensionoj kaj ĉe privatuloj al: Kongress- und Verkehrsstelle München G.m.b.H., Abteilung Fernvermittlung "Reita", Hauptbhf.-Südbau, München.

Vi povas sendi vian mendilon kune kun la koncerna mono al via karavan- gvidanto, landa asocio, U.E.A. aŭ rekte al la 36-a Universala Kongreso de Esperanto, Engelbertstr. 7, München-Pasing, Germanujo.

Germanoj, kiuj deziras ĉambron en hotelo, pensiono aŭ ĉe privatulo, devas sendi la mendilon kaj la monon per speciala "Zahlkarte" rekte al Kongress- und Verkehrsstelle München G.m.b.H. (ne al L.K.K.).

**Mendilo sen samtempa pago ne valoras.**

Jen la prezoj por unu nokto por unu persono. La kongresa semajno estos de sabato la 4 aŭg. ĝis sabato la 11 aŭg. tagmeze, do 7 noktoj.

### Aranĝo A : Hotelo :

Lito kaj matenmanĝo, kun servmono.

|           |   |          |
|-----------|---|----------|
| Kategorio | 1 | GM 17.00 |
| "         | 2 | GM 15.00 |
| "         | 3 | GM 13.00 |
| "         | 4 | GM 10.50 |

### Aranĝo B : Pensiono :

Lito kaj matenmanĝo, kun servmono.

Kategorio 5 GM 9.00

" 6 GM 8.00

### Aranĝo C : Ĉambro ĉe privatulo :

Lito kun servmono.

|           |   | Kun        | Sen     |
|-----------|---|------------|---------|
|           |   | matenmanĝo |         |
| Kategorio | 7 | GM 7.50    | GM 6.00 |
| "         | 8 | GM 6.50    | GM 5.00 |
| "         | 9 | GM 5.50    | GM 4.00 |

### Aranĝo D : Amasrestejo :

Oni devas kunporti litaĵon, lanan kovrilon kaj mantukon.

Kategorio 10 GM 1.00

La prezo unu gm. por unu nokto estas nur provizora. Se la tranoktado en la amasrestejo kostas malpli vi ricevos dum la kongreso la tro pagitan sumon.

### Aranĝo E : Tendarejo kun propra tendo :

Kategorio 11 senpaga.

Ĉe frua mendo vi estos pli bone prizorgata, i.a. vi ricevos ĉambron kiu estas proksima de la Kongresejo, kaj vi krome helpas al L.K.K. organizi la kongreson.

## Statistiko de kongresanoj : 30 nov. 1950

Argentino 1, Aŭstrujo 7, Belgujo 7, Brazilo 1, Britujo 38, Ĉeĥoslovakujo 4, Danujo 5, Egiptujo 2, Finnlando 2, Francujo 18, Germanujo 143, Italujo 4, Jugoslavujo 3, Nederlando 12, Norvegujo 3, Pollando 4, Portugalujo 1, Sarlando 2, Svedlando 20, Svislando 5, Usono 2. Sumo 284 el 21 landoj. (330 je 10 dec.)



# Himno de l' Eŭropa Junularo

Vortoj kaj muziko de Carl Fohr, trad. de J. F. Berger



1. Po - po - loj eŭ - ro - paj, ni kres - ki de - zi - ras. Ku-
2. So - pi - ras po - po - loj la pa - con, li - be - ron, La-
3. An - taŭ - en, ju - nu - loj, ek - fla - gras la fla - mo Mon-



1. ra - ĝe ni ve - nas kun pu - ra la kor'. La
2. bo - ron ho - min - dan su - fi - ĉa kun pan'. Sen-
3. tran - ta la vo - jon al be - la e - pok'. En



1. pa - con e - ter - nan ni ar - de as - pi - ras, O-
2. i - gi ni vo - las je lar - moj la te - ron. Tro
3. ko - roj sen - nom - braj ek - bru - las la a - mo. Jen



1. fe - roj de vi - vo kaj sang' res - tu for!)
2. mul - tajn eks - ter - mis del' Mort, kru - da man'. ) Ni sta - ras ko-
3. pre - taj ni sta - ras por pa - ca al - vok'. )



mu - ne en tu - ta la mon - do, A - mi - kon nur vi - das



en la naj - bar', Tam - bu - roj mu - ti - ĝas en ni - a lig-



ron - do, Al al - ta la cel' mar - ŝas ju - na ho - mar'.

Mason Stuttard :

## *Formovo de Antikva Vinkelo*

*Unika inĝeniera operacio*

EN 1938 iu ministeria instanco faris decidon konstruigi en Whitehall, la fama avenuo de ministerioj en la koro de Londono, grandegan kontor-komplekson, kiu estu sidejo de diversaj administraj centroj.

Tuj trudiĝis problemo. Kion oni faru pri la ampleksa kaj gravega—laŭ historio kaj arkitekturo—vinkelo, kiu iam apartenis al Henriko VIII-a, la *gaja monarko* ?

Tiu antikva monumento—se oni povas tiel priskribi kelon—troviĝis ĝuste tie, kie oni projektis la novan konstruaĵon. Se oni lasus ĝin resti, ĝi trude malharmonius kun la arkitektura desegno de la nova. Cetere oni malŝparus valoregan spacon. Neniu povus trankvile pripensi detruon de konstruaĵo, kiu post kvar jarcentoj ankoraŭ troviĝas en bona stato, eĉ sen konsidero pri arta kaj historia valoroj.

La kelo troviĝis en Whitehall Gardens sur la loko, kie antaŭe imponis Palaco Whitehall. Poste nomatan York House (Domo York), tiun konstruaĵon pliampleksigis kaj luksege meblis Kardinalo Wolsey, kiam li akiris ĝin en 1514. Post sia *forfalo de graco* pro sia kontraŭstaro al la manipulado de la edziĝaj leĝoj—eble pli ĝuste la eksedziĝaj leĝoj!—flanke de la reĝo, Wolsey devis cedi la belan domegon, kaj Henriko VIII-a akiris ĝin. Nun oni ĉiam parolas pri la vinkelo de Henriko VIII-a.

La konstru-ministerio decidis levi la tutan kelon, formovi ĝin, elfosi truon konvenan kaj poste remeti la

kelon 7 metrojn pli profunden por ke ĝi ne maloportunu al la konstruado de la nova kontoraro. La fakto, ke la kelo estis longa 21m., larĝa 11m. kaj alta 7½m. ne estis per si motivo por eksterrutinaj antaŭtimoj. Ne malofte okazis—precipe en Usono—ke oni movis aŭ transportis tutan domegon aŭ konstruaĵon de unu loko al alia, eĉ je konsiderinda distanco; sed dum je tiuj operacioj temis pri simpla transigo de ŝtalkadra aŭ ligna konstruaĵo horizontale, la inĝenieroj ĉi tie frontis al la problemo levi la kelon, kiu ne estis solida tuto, transporti ĝin kelkan distancon, kaj remeti ĝin en la truon preparitan.


Nenie en la historio troviĝas registro pri tia inĝeniera operacio !

Emfazinde estas, ke ne temis pri solidaj muroj, eĉ ne pri ia rigida konstruaĵo, sed pri plejeble disfalema arkitekturaĵo. Unu muro de la vinkelo estis konstruata en la 13-a jarcento kaj estis dika preskaŭ 2m. Alia muro dikis metron. Gravis la fakto, ke la muroj estis ŝeloj kun kerno de malfiksa rubo. Eĉ la plej eta skuo aŭ vibro povus sekvigii rompiĝon de la muroj kaj eventuale kolapson de la tuto. Jam troviĝis en la muroj kelkaj tre malbonaŭguraj fendetoj.

Nenio okazis, pro la interveno de la milito, ĝis lastatempe. Sed pro la urĝo trovi hejmon por multaj kontoroj, oni komencis la laborojn en la lasta jaro.

La unua afero estis rigidigi la tutan internon kaj aranĝi, ke io provizore transprenu la pezon de la volbita tegmento. Oni do konstruis interne





[Foto : Ministry of Works]

ŝtalan kradaĵon, kaj ekstere pli-fortigis per ŝtaltraboj la ŝelon de la kelo. Tiuj vertikalaj traboj estis fiksitaj al specialaj horizontalaj traboj el ŝtalo, kiuj etendiĝis sub la tuta kelo. Tion farinte oni komencis levi la tutan koloson. Tra la operacio la inĝenieroj devis havi preskaŭ superhoman-paciencon kaj observi nepriskribeblan zorgemon. Estis absolute necese, ke en ĉiu stadio de la movado la horizontalo de la kelo konserviĝu perfekte. Neniu delikata porcelano ricevis tiom da ama prizorgo, kiom tiu 800-tuna kelo !

La flankenmovado estis pli simpla ol oni eble supozas. Nur kvar krikoj —horizontale instalitaj—estis uzataj. Kvar homoj funkciigis ilin precize en la sama momento kaj la grandega amaso antaŭenglitis sur speciale konstruitaj ruliloj *po unu centimetro je ĉiu fojo* ! Je tiu, eĉ ne limaka,

rapido oni movis la kelon proksimume 15 metrojn en semajno !

La tero sur kiu la kelo estis starinta, estis elfosata ĝis plia profundo de 7 metroj. En la granda truon oni konstruis fortegan kaj komplikan trabaron el ŝtalo kaj kiam ĉio estis preta la inĝenieroj revenigis la kelon . . . . samrapide kiel antaŭe.

Por la mallevado oni uzis 186 krikajn, kapablajn levi/mallevi po 16 tunoj. La ŝtaltrabaro estis aranĝita laŭ serio de *etaĝoj* tre proksimaj unuj de la aliaj kaj sur kiujn oni laŭvice kuŝigis la amason. Tiu aranĝo ebligis detalegan kontrolon de la operacio. La rapido de mallevado estis po 5cm. en horo ! Por ĉiu stadio de 25cm. estis necese ŝraŭbi kaj malŝraŭbi 3,000 boltojn, kaj la movojn de la armeo da laboristoj ĉe la turniloj de la leviloj oni devis sinkronizi por certigi absolute regulan iradon de la operacio.



La kelo fine kuŝis sur la fundamentoj. Restis nur forigi la *splintojn*\* kaj *bandaĝojn* de la paciento. Oni ĉion remetis interne laŭ la originala aranĝo, kaj la muroj estas netrude riparitaj tiel, ke ili estas nun pli firmaj kaj pli solidaj ol iam antaŭe. La reĝa vinkelo efektive estas denove si mem, kaj la publiko nun povas, kiel antaŭe, viziti ĉi tiun originalan restaĵon el la pasinteco en la koro de la granda metropolo.

\* splinto=ligno-lameno uzata por teni rigida rompitan oston.

Ni deziras esprimi nian dankon al la Ministry of Works (Konstru-ministerio) kiu afable pruntis al ni la foton kaj permesis ĝian publikigon.

(daŭrigo de p. 6)

Mallonge, ni profunde sentas la veran universalismon, kies konsistigaj partoj estas: egaleco de ĉiuj homoj, spirita libereco, socia justeco, kaj interpopola paco.

Tiun ĉi vere revolucion ŝanĝigon en la pensomaniero kaj sentado, kiun kreas la Internacia Lingvo; tiun ĉi transformigon de mallarĝa nacia konceptado al universale homa konceptado, kaŭzitan de la Internacia Lingvo, komprenis same bone, aŭ eĉ pli bone, la malamikoj de universalismo, ol ĝiaj adeptoj, ol, kelkfoje, eĉ la esperantistoj mem!

Ne estas hazardo, geamikoj, ke ĉiuj tiranecaj kaj despotecaj reĝimoj levis sin kontraŭ Esperanto, malpermesis la lingvon, persekutis la esperantistojn! Se Esperanto estus ia infanludilo, se pere de ĝi oni ne povus interkompreniĝi, se ĝi havus nenian idean signifon, kredu al mi, ke ili grandskale propagandus ĝin! Sed ĉar la Internacia Lingvo havas grandegan spiritan forton, ĉar ĝi troviĝas

ĉepinte de universalismo kaj tut-homeco, ĝi estis kaj estas atakata de ĉiuspecaj ŝovinistoj. Tiuj atakoj ne devas nin timigi nek senkuraĝigi. Kontraŭe, ni fieru pri ili! Ni fieru, se tiraneco nin kontraŭstaras, ĉar tiraneco ĉiam kontraŭstaras noblecon kaj veran progreson. Tiuj atakoj konvinku nin ankoraŭ pli firme pri la praveco, vereco, kaj grandeco de nia afero. Ni konsciu, ke la spirito neniam estis venkita krom se ĝi mem rezignis pri defendo kaj rezisto! La ideon oni povas nek enkatentigi, nek aresti, nek mortigi! Ĝuste tial jam okazis, kaj ankoraŭ okazos, ke vastaj imperioj malaperis, ke iam tremigaj diktatoroj kaj aŭtokratoj falis, sed nia Esperanto restis, vivas kaj prosperas, altrudiĝante ĉiam pli impete al la vekiga konscienco de la homaro.

En la nepra venkado de universalismo venkas ankaŭ Esperanto. Kun venkado de Esperanto la vera, sincera universalismo akiras novajn poziciojn. Pri tio ni ĉiuj estu profunde konsciaj!

(En la sekva parto la oratoro analizas la universalecon de nia U.E.A., kiu respegulas la universalecon de la lingvo. Li finas sian paroladon per alvoko al pli unueca, pli oferema laboro de ĉiuj esperantistoj por baldaŭ atingi de la fina celo en la intereso ne nur de teknika, sed ankaŭ de spirita interkompreniĝo de la homoj).

**Ivo Lapenna**

## **RETORIKO**

kun aparta konsidero  
al


Esperanta Parolarto

215 p. broŝ. prezo 10 ŝil. afr. 6 p.

**Mendu ĉe U.E.A.**



# Vivo Virina



Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas : S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Karaj samideaninoj,

Kun granda plezuro mi skribas al vi mian unuan komunikon, kiel gvidantino de la nova rubriko *Vivo Virina*. Sub ĉi tiu rubriko estos

verkata paĝo por kaj de virinoj. Tio ĝis nun estis granda manko. La virino estas tiu, kiu faras la hejmon, la bazon de firma kaj sana vivo. Ŝi prizorgas kaj edukas la infanojn, la civitanojn de la estonta mondo. Angla proverbo diras : *La mano, kiu movas la lulilon, regas la mondon*. Virinoj nuntempe havas pli senperan influon en la mondo ĉar ili ludas gravan rolon en la profesiaj kaj politikaj sferoj.

Sur nia paĝo ni klopodos trakti ĉiujn virinajn aferojn, gravajn kaj ordinaraĵojn. Ĉi tiu paĝo enhavos notojn pri diverslandaj nutraĵoj, virinmodoj, infanzorgo, virinrajtoj, virinaj atingoj.

Ĉi tiu paĝo, karaj legantoj, estas via paĝo, kaj ni estos feliĉaj ricevi novaĵojn pri virinaj aferoj el via lando, ĉu receptojn, informojn pri novaj modoj, eltrovaĵojn por la kuirejo kaj la hejmo, aŭ raportojn pri virinoj kiuj faras ion neordinaran en la mondo. Ni estos aparte feliĉaj ricevi leterojn, kiuj priskribas la vivon kaj problemojn de virinoj en ĉiuj landoj kaj kiuj diros al ni tion, kion vi deziros legi sur ĉi tiu paĝo.

Mi finas ĉi tiun mian leteron al vi kun bondeziroj pri la Nova Jaro kiu nun komenciĝas. Mi esperas, ke ĝi alportos al ni ĉiujn pacon, sanon kaj kuraĝon, kaj sukceson al nia nova *Esperanto* kaj al nia lingvo.

R.M.D.

## La recepto de la monato

*Tranĉaĵoj de soleo kun  
karotoj kaj agarikoj*

Ingrediencoj : 4 aŭ 6 tranĉaĵoj de soleo ; malgranda kvanto da akvo, cidro kaj lakto ; citrona suko ; butero, faruno kaj lardo ; spicoj ; kelkaj agarikoj kaj cepetoj.

Metodo : Unue preparu la farĉaĵon. Preparu la agarikojn kaj cepetojn. Haku ilin malgrandaj. Kuiru malrapide kun la lardo ĝis ili moliĝas. Almetu citronan sukon kaj iom da

hakita petroselo. Spicu per salo kaj nigra pipro.

Prenu la tranĉaĵojn kaj aspergu ilin per citrona suko, salo kaj pipro. Metu grandan plenkuleron de la farĉaĵo sur ĉiun tranĉaĵon kaj faldu. Metu en boligilon, ĉirkaŭverŝu la cidron kaj akvon. Kuiru malrapide (15 ĝis 20 minutojn). Kiam la tranĉaĵoj estas kuiritaj, prenu ilin el la likvaĵo kaj metu en varman lokon. Faru saŭcon el butero, faruno kaj la likvaĵo en kiu la fiŝo kuiriĝis. Verŝu la saŭcon sur la fiŝon kaj garnu per karotoj, agarikoj kaj petroselo.

# TRA LA LIBRARO

\*=akireblaj ĉe U.E.A.



**\*La eta kato kiu ne volis morti :**  
trad. Lentaigne :  
eld. "Presarto en  
Lernejo" ; 18 ×  
14cm. 16p. broŝ. prezo 6p. afranko 1p.

Jen vera nekutimaĵo en nia literaturo. Libreto verkita **de** infanoj (5-jaraj) **por** infanoj. Ĝi estas ekzemplo de tre interesa okupo praktikata en multaj Francaj (kaj aliaj) lernejoj por instigi la infanojn en la verkado kaj por instrui pri la presarto, ĉar ili ne nur verkas la proprajn librojn, sed eĉ mem presas ilin. Tre necesas kompreni ĉi tion antaŭ ol legi la libreton, alie ĝi eble ne ricevus la meritatan ŝaton.

La frazoj estas tre taŭgaj por la juninfana kompreno—mallongaj, simplaj, bone aranĝitaj por facila legado kun ilustraĵo sur ĉiu paĝo. Pri la traduko, nemulto estas kritikebla.

Bedaŭrinde estas, ke la temo elektita estas tiel malĝojiga. Ĝi rakontas pri atenco kontraŭ la vivo de malgranda kato—krueleco senkompate prezentita kun fino neniel pli feliĉa. Ĝi certe ne plidelikatigus la junan menson, kaj elvokus kontraŭon de la bestamanto. Krom instrui la verkadon, legadon kaj presarton, la instruisto havas tre gravan devon gvidi la moralan edukadon de la infano ! Oni povus ankaŭ pridiskuti ĉu niaj infanoj ne meritas bildojn de pli matura mano. De la pedagogia vidpunkto la verketo estas bonega ekzemplo de infana laboro.

*Eric Revill.*

**\*La Rubajto de Omar Kajjam** (laŭ Edward Fitzgerald). Trad. D-ro C. M. Bean. Represo el *The British Esperantist* ; 22 × 14cm. 6 p. broŝ. prezo 1 ŝil. plus 1 penco afranko.

La ĉiam vivanta mieno de Omar Kajjam—persa poeto kaj scienculo mortinta antaŭ 800 jaroj — estas ridema kaj ĝuema, sed liaj okuloj estas lacaj kaj melankoliaj pro la scio pri nia senpovo kaj pro la nerevokebla pasemo de la vivo. Tiu ĉi dualismo de la sama vizaĝo aperas en ĉiu unuopa rubajto (t.e. kvarlinia memstara strofo) de la granda perso, kies riĉe disŝutitaj poemetoj iĝis aparta ĉefverko ankaŭ en la angla literaturo dank' al la genia reverkado de Fitzgerald. Lia kontribuo ne estis nur tiu de tradukinto ; li donis el si mem pli multe ol tradukantoj faras, li serĉis nur la agordojn kaj liberigis sin de la preciza angligo de la vortoj ; li aldonis novajn versojn kaj ilia agordo ne diferencas de la ceteraj. El la tiel kreita renaskita verko senmanke radias la mistere ĉarma miksiĝo de la du mienoj, ĵus menciitaj, ĉar renkontiĝis du grandaj poetoj, kies animoj estas sur la samaj ondolongoj. La poezio de Kajjam tute ne estas abstinenco, male, en ĝi sanktiĝas orientece la ebrio, kiu sola kapablas forvualigi la seniluzian veron. Karakterizaj ekzemploj—la traduko de C. M. Bean—estas la jenaj du rubajtoj :—

Dum floras la rozoj en apudrivera  
pejzaĝo,  
La vinon rubenan trinkadu kun mi  
sen domaĝo ;  
Kaj kiam l'Anĝelo kun sia Pokal'  
pli malhela  
Alpaŝos al vi, **Ĝin** eltrinku kun bona  
kuraĝo.



L'espero mondeca tenata de homo  
 en kor'  
 Cindriĝas—aŭ plenumiĝinte al  
 granda honor'  
 Simile al neĝ' sur la polva vizaĝ' de  
 l'dezerto  
 Briletas kelkhore—kaj jen estas for.

Kiel la ekzemploj montras, speciale la lasta, la tradukinto estas kapablulo. Li eminente sukcesas transplanti multajn el la Kajjam-Fitzgeraldaj poemetoj en nian lingvon. Se oni tamen kelkloke sentas mankon, tio dependas de la manko de la *Fitzgeralda* kuraĝo. En tiuj strofoj, kiuj ne prezentas la saman elvokan rezulton kiel ekz-e la laste citita, la tradukinto tenis sin supozeble tro fidele al la angla teksto. Se oni komparas tiujn strofojn kun diversaj nacilingvaj tradukoj, oni konstatas, ke la Esperanta varianto de tiuj strofoj estas eble pli konciza (kelkfoje je la konto de la komprenebleco) pli kompleta, sed nekompareble pli seka ol la nacilingvaj tradukoj de la samaj strofoj. Ankaŭ la nemalofte reaperantaj adasismoj aldonas iom al tiu ĉi impresio de la sekeco, same tiuj rimedoj, per kiuj la tradukinto kelkloke plenigas la akcentlokojn de la versoj, kiel ekz-e la lingve apenaŭ permesebla *la kiu*. Tute male, oni trovas ankaŭ bonŝancajn poeziajn liberaĵojn en la traduko; ekz-e la trisilaba varianto de *kien*, t.e. *al kie*, estas bona solvo, tamen kun dividstreko inter la du vortoj.

Espereble la libreto aperos iam en nova, ne kajeroforma sed libroforma aspekto. Sed certe ĝi estas jam en sia nuna formo valora kompletigo de nia tradukliteraturo.

*F. Szilágyi.*

**EPOKO**

# KISO DE LA REGINO

**I. F. NAJIVIN**

**N-ro 10 en la EPOKO-serio ĵus aperis**  
*(Aventuroj en la Kongo Belga)*

*Eldonita de :*

**The Esperanto Publishing Co. Ltd.**

*Mendu ĉe :*

**Universala Esperanto-Asocio**  
**Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo**  
 (Prezo : 3ŝ. 9p., aŭfranko 3p.)

**R. Edis Fairbairn :**

## *Domkonstruado*

**M**I ĉiam havis la deziron provi mian talenton je iu formo de domkonstruado. La ligno-prilaboro, kiun mi jam faris, estis nur bagatelo, plie meblofarado ol ĉarpentado. Meblofaristoj inklinas iom malestimi ĉarpentistojn, kiel malpli superan specon de homoj, kvankam mi ne povas kompreni kial. Ili respektive disponas pri tute apartaj kompetentoj. La unu prilaboras malmollignon kaj tranĉas juntojn kiuj lerte interkroĉiĝas kaj restas kunaj pere de gluo; dum la alia uzas trabojn kaj najlojn kaj kunmetas grandajn kadrojn, kiel domfasadojn, domo-murojn, tegmentojn kaj ŝtuparojn.

Tamen, kiel mi jam diris, mi delonge sopiris entrepreni ian domkonstruadon. Do pasintan vintron, manke de io pli valora, mi efektive klopodis kaj konstruis domon, efektive duetaĝan, kaj kvankam mi—kiu ne devus—tion asertas, la fakto restas, ke profesiulo ne estus povinta fari pli bone.

Sekvis la problemo pri enloĝantoj. Vi scias, kiel la afero staras jam de jaroj, ĉu ne? Centoj, eble miloj, da familioj tra la tuta lando primarĉandus sian senmortan animon por akiri loĝejon tute sia. Vi do ne miros, kiam mi diros al vi, ke jam en la daŭro de du tagoj la domo estis okupita. Sed . . . la enloĝantoj eĉ ne konsultis min pri lukondiĉoj. Simple eniris la malplenan domon kaj ekposedis ĝin! Aplombo? Ja kaj ankoraŭ!

Vi certe vidis pasaĝerojn en vagonara kupeo sternintajn siajn posedaĵojn sur la sidlokojn, kaj kiom

nevolonte ili formovas ilin kiam sensidloka pasaĝero atende staras. Ĉi tiu paro faris ĝuste tion. Por fortendi eventualajn kandidatojn por la dua loĝejo ili enmetis en ĝin multe da aĵoj, kiuj ŝajnigis la loĝejon okupita.

Povas esti, ke je ĉi tiu punkto mi ŝuldas al vi iom da klarigo. Vi sendube scias, kiel ofte okazas, ke ambiciaj revoj pri grandaj entreprenoj, sub la malvarma lumo de la racio, fariĝas nur etaj aferoj. Nu, tiel estas pri mia domkonstruado. Mi petas vian indulgon. Temas fakte pri birda domo, kaj miaj enloĝantoj estas paro de parvoloj.

Estas surprize, kiom homsimilaj ili estas en multaj rilatoj. Tio kion mi ne scias pri birdoj kaj birdaj domoj plenigus tutan libron, kaj unu afero, kiun mi ne sciis, estis tio, ke parvoloj ne estas sociemaj! Tion diris al mi amiko vidinte la du etaĝojn. Li diris, ke parvoloj tute ne volas fari siajn nestojn tiel proksimaj unu de alia. Mi tamen pendigis ĝin ekster mia dormĉambra fenestro. La enloĝantoj jam demonstraciis sian inklinton pri privateco, konstruante neston en ĉiu fako. Evidentiĝas tamen ke ili montras preferon por la supra etaĝo al kiu ili donas pli da atento. Mi povas stari je proksimume duonmetro de ili kaj observi ilin tra la kurteno. Kiam mia edzino forigis la kurtenon, mi timis, ke tio eble fortimigos ilin; sed ne, ili tute ne atentis nin.

Johanjo kompreneble estas la laborulo. Joĉjo ĉirkaŭflugas, aliĝas sur la fenestro-sojlon, iafoje alportas branĉeton, kutime por la malsupra etaĝo, kaj ĝenerale pretekstas, ke li



lerte direktas aferojn. Li memorigas min pri la anekdoto de Mark Twain pri la Ĝardeno Edena. Kiam Nia Sinjoro elpelis Adamon kaj Evan el la ĝardeno kaj ordonis al ili perlabori siajn vivrimedojn, Adamo diris: "Malbela afero! Ni tamen devos fari nian plejblon. Mi direktos aferojn!"

Amuze estas rigardi ilin alveni kun branĉeto transverse en la beko. Ili provas eniri jen tra unu trueto, jen tra la alia. Post kelkaj vanaj provoj ŝi—mi supozas, ke estas ŝi—tre ekscitiĝas; efektive ŝi tre ekkoleras kaj batas la branĉeton kontraŭ la stangon tiel, ke oni supozus, ke ŝi rompos al si la kolon. Tio, kion ŝi tamen rompas, estas la branĉeto. Je

tio ŝi aŭ metas duonon en la loĝejon aŭ faligas ĝin tute tedite. Laŭ ŝia aspekto mi suspektas, ke ŝi pensas—se ŝi fakte ne diras — birdan blasfemaĵon!

Ju pli oni pensas pri ĉi tio, des pli ni miras pri la instinkto konstrui neston. Kiel la birdo scias konstrui? Ĉu ĝi scias kion ĝi faras, kaj kial? Aŭ ĉu temas pri blinda kaj nekonscia instinkto? Se jes, kio igas birdon reveni jaron post jaro al la sama nesto kaj kanti, ho tiel ĝoje, kvazaŭ ĝi dirus: "Hola, homoj! Jen mi estas denove, kaj ĉu ne estas bele vivi?"

*Esperantigita de M.S.  
kun permeso de la aŭtoro.*



## FAVORA PREZO!

Libroservo de U.E.A. sukcesis akiri favorpreze provizon de

# INTERNACIA POSTMARKA KATALOGO

(eldonita de Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj)  
kiun ĝi nun ofertas je la atentinda prezo

2 ŝil. 6p., afranko 3p. aŭ 8 int. respondkuponoj, afrankite

Ĉi tiu verko siatempe vekis sensacion en filatelaj kaj Esperantistaj rondoj, kaj ĝi fakte estas unika en la Esperanta fakliteraturo. Bone presita sur artpapero, kun ilustraĵoj, ĝi estas bela volumeto akirinda ne nur de poŝtmark-entuziasmoj, sed ankaŭ de ĉiu serioza samideano, kiu volas posedi gravan Esperantan verkon.

La katalogo traktas la poŝtmarkojn de Grandbritujo, kaj krome donas multajn informojn utilajn al la kolektanto kaj interesajn por la nekolektanto.

**NEPRE PROFITU LA OKAZON FARI BONAĈETON!**

*Mendu ĉe Libroservo de*  
**Universala Esperanto-Asocio**  
**Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo**

**ENIGMA KONKURSO N-ro 54**

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy,  
20-A Avenue Molière, Brussel-Forest,  
Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en Konkurs  
N-ro 52.

**N-ro 112 :** Sen rigardo sen gardo.  
Ŝlosilvortoj: soldato, festeno,  
anemono, koturno, brigado, legacio,  
prepari, kardelo, gondolo. (La klarigo  
de 4 apartenis al 8 kaj male. De  
tiuj, kiuj pro tiu eraro ne trovis la  
esprimon, sed cetere bone solvis, mi  
akceptis tion kiel kompletan solvon).

**N-ro 113 :** Sian sorton neniu evitas.  
Ŝlosilvortoj: persiko, ĉapitro,  
barakti, anonima, mensogi, kolonio,  
estrado, destini, melodio, burnuso,  
erinaco, baterio, kelnero, aksiomo,  
furunko, penetri, frivola, atribui,  
epiteto, eskadro, konsumi.

**N-ro 114 :** Ankoraŭ neniu evitis la  
sorton. Ŝlosilvortoj: falango, analizi,  
skarabo, sociala, brasiko, kamelio,  
aŭreolo, intrigi, bedaŭri, interna,  
violono, tualetto, ĉevrono, kvankam,  
fiktiva, stimuli, rimarki, aspergi,  
almenaŭ, variolo, asimili, koboldo,  
privata, staturo, loterio, inversa.

**Enigmo N-ro 118 :** 1. grado ; 2.  
talpo ; 3. kloŝo ; 4. arogi ; 5. ankro ;  
6. greno ; 7. karbo ; 8. stari ; 9.  
lepro ; 10. ambro ; 11. atomo ; 12.  
aleno ; 13. kazeo ; 14. animo ; 15.  
mardo ; 16. droni ; 17. dalio ; 18.  
laŭro ; 19. plano ; 20. alteo ; 21.  
kremo ; 22. kameo ; 23. flamo ;  
24. trupo ; 25. sakro ; 26. marĉo ;  
27. verda ; 28. amelo ; 29. tikli.

Anstataŭigu unu el la literoj de la  
ĉi-supraj vortoj per alia litero tiel, ke  
vi de la novaj kvinoj da literoj povas  
formi vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj.  
La novaj literoj formas en la donita  
sinsekvo esprimon el la *Proverbaro* de

D-ro Zamenhof. 1. frukto ; 2.  
parencio ; 3. rimeno ; 4. pezunuo ;  
5. dorna planto ; 6. grado ; 7.  
kantisto ; 8. kapvesto ; 9. vestaĵo ;  
10. markrustulo ; 11. monato ; 12.  
besto ; 13. malkleraĉulo ; 14. vizaĝ-  
esprimon ; 15. fabela besto ; 16.  
pikilo ; 17. patrujo ; 18. manĝaĵo ;  
19. militisto ; 20. trinkaĵo ; 21.  
monunuo ; 22. resuma ; 23. pastro ;  
24. rabobesto ; 25. remaĉulo ; 26.  
signo de ĉagreno ; 27. birdo ; 28.  
birdo ; 29. arbo.

**Enigmo N-ro 119 :** aer - ajl - akc -  
akv - amb - amo - ana - ano - ano -  
aro - atm - ato - ato - ato - bal - cim -  
cip - dik - dik - dol - egr - eno - ero -  
fes - gio - ide - iko - ile - ina - ino - ist -  
kan - kco - man - mar - nco - nto -  
obs - opl - oro - osf - pos - pre - pro -  
rio - rki - sem - sin - spe - sto - tel -  
tru - tul - ula.

El la ĉi-supraj litergrupoj formu  
18 naŭliterajn vortojn laŭ la ĉi-subaj  
klarigoj, kaj kies mezaj literoj formas  
esprimon el la *Proverbaro* de D-ro  
Zamenhof.

1. ĉirkaŭantaj cirkonstancoj ; 2.  
kuko ; 3. malfeliĉa okazo ; 4. vorto  
esprimanta kvaliton ; 5. adepto de  
ĥaosa vivmaniero ; 6. societo por  
defendi korporaciajn interesojn ; 7.  
instruisto ; 8. vegetaĵo ; 9. scienco  
pri la vojo de pafitaj korpoj ; 10.  
tezo, kiu estu akceptata kiel vera,  
kvankam ne demonstrata ; 11. intenca  
malhelpado ; 12. veturilo ; 13. mal-  
granda kvanto da komercaĵo ; 14.  
lernejo ; 15. depeŝo ; 16. movebla  
hospitalo ; 17. muzikilo ; 18. multaj  
friponoj.

**Se ĉiu leganto varbos nur unu  
novan leganton, ni povos multe  
pligrandigi nian revuon.**





# POR VIA DISTRO

Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

## Demokratio

“Mi fine inklinas kredi, ke ja estas io bona en ĉi tiu nova demokratio pri kiu oni multe trumpetis. Ekzemple, la mastro je la deka kaj duono invitas al kafotrinko. Tio okupas horon. Poste li opinias, ke apenaŭ valoras reiri en la kontoron kaj invitas al promeno en la parko. Kiam alvenas la lunĉoro li veturigas onin al unuaklasa restoracio kaj regalias per luksa manĝo kun vino, kaj mi ne scias kio . . . . Tio daŭras ĝis preskaŭ la tria ; li ja estas agrabla parolanto kaj la tempo flugas. Je tio li diras, ke estas bela posttagmezo, ĉu fari ekskurson en la aŭto ? Do dum la resto de la posttagmezo oni kuras ĉirkaŭ la kamparo. Jes ja, bela afero ĉi demokratio ! Oni tetrinkas kaj en la vespero iras al teatro. Poste denove manĝon kun ĉampano, kaj en la apartamento de la mastro mem ! Ŝajnas . . . .”

“Sed, amiko, momenton ! Ĉu vi volas diri al mi, ke ĉio ĉi okazis al vi ?”

“Al mi ? Fulmotondro, ne ! Sed al mia fratino !”

## Helpemo

Paŝante laŭ la trotuaro sinjoro rimarkis viron kuŝantan sternita sur la ŝtonoj. Li tute ne moviĝis. Iom maltrankvila, li alkuris kaj komencis apliki rimedojn por respirigo. Post kelkaj momentoj la viro fine levis la kapon kaj diris : “He vi, ulo, mi ne scias, kion vi celas, sed mi riparas la gastubojn !”

## La progreso

Viro renkontis konaton kaj komencis fanfaroni pri sia moderna domo kun ĉiuj lastatempaj eltrovaĵoj. Li invitis la konaton hejmen por demonstracii la instalaĵojn. Montrinte ĉion, li diris : “Kaj nun mi volas montri al vi la plej lastmodan. Vi certe rimarkis, ke ni ne havas banĉambron. Nu, jen. Mi premas ĉi tiun butonon kaj elektre funkciigata bankuvo glitas el la alkovo, jam kun varma akvo kaj ĉio preta por la bano, jen !”

Kia domaĝo, ke en tiu momento lia edzino ĝuis banon !

## I. A. P. K.

agadas laŭ la regulo “Esperanto en la praktiko”.

Per nia Filatela Servo vi povas ricevi filatelaĵojn (novajn poŝtmarkojn, unuataĝajn kovertojn, okazajn stampojn, katalogojn, kilomiksaĵojn k.t.p.) malmultekoste.

Dum la jaro 1951 nia revuo eniros en la valoregan kaj belaspektan svedan esperantogazeton *La Espero*, kiu aperos ĉiumonate. Tie estos via senkosta interŝanĝanonco presata.

Nia jarkotizo fakte estas nenio, ĉar la kotizo estas la sama kiel la abonkosto de la gazeto, nome 8 ŝil. 4 pencoj anglaj aŭ 1.20 usonaj dolaroj aŭ 20 internaciaj respondkuponoj.

Kontraŭ du respondkuponoj ni sendos specimenon de la gazeto enhavanta niajn informojn.

**ATENTU LA NOVAN ADRESON :**

**Internacia Asocio de**

**Poŝtmark-Kolektantoj,**

**Box 5085, GÖTEBORG, Svedujo**

Prof. G. Waringhien :

## *Pri la nomoj de la Esperantaj literoj*

La 1-a paragrafo de la Fundamenta Ekzercaro tekstas : “Nomoj de la literoj : a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.” Kaj efektive tiaj estas la nomoj ordinare uzataj, kiam oni havas okazon por nomi literojn—kio estas sufiĉe malofta okazo en la ĉiutaga vivo.

Sed kun la kresko de la tempo kaj la disvastiĝo de nia lingvo ekuzis ĝin grupo da personoj, kiuj havas profesian okazon regule kaj ofte citi la literojn per ilia nomo—mi aludas la matematikistojn kaj la kemiistojn. Nu, tiuj specialistoj rapide konstatis, ke la ĉi-supra nomaro estas neoportuna, ĉar ĝi ebligas aŭ eĉ estigas konfuzojn ĉe la aŭdantoj. La kaŭzo estas duobla : unue, la vokalo *o* estas aparte sonora, kaj sekve ĝia sonoro obtuzigas la sonon de la antaŭa konsonanto, precipe se tiu ĉi estas malforta ; due, la konsonantoj, kies propra sono najbaras tiun de alia konsonanto, malfacile distingiĝas pro simileco de la komuna vokala finaĵo (ekz-e *mo* kaj *no*, *ĵo* kaj *ŝo* k.t.p.). Por helpi al tiu ĝeno, jam ekde 1909 estis proponitaj diversaj sistemoj de nomado, el kiuj tamen neniu estis eĉ unufoje aplikita, tiel ke la problemo restas efektive nesolvita. Mi provos miavice proponi novan, eble pli racian solvon.

La unua farotaĵo estas difini la kondiĉojn de la problemo ; ideala solvo devus kontentigi du postulojn : 1-e ne atenci la Fundamenton ; 2-e ebligi efektivan distingon de la najbaraj konsonantoj. Ŝajnas vere stranga, ke la jam proponitaj solvoj respondas al neniu el tiuj du postuloj.

La komence memorigita teksto de la Fundamento tenas nin inter striktaj limoj : estus tute neeble, ekz-e, adopti la prononcon *zed* aŭ *jot* por la literoj *z* kaj *j*, kiel proponis iam s-ro Moch. Sed tiu teksto tamen lasas al ni kelkan liberon, se oni bonvolas profiti la flekseblecon de nia lingvo. Kial Zamenhof elektis finaĵon *o* por la literoj ? Evidente, ĉar li traktis iliajn nomojn same kiel ĉiujn aliajn, montrante ilin per la distinga signo de la substantivo. Nu, ekzistas alia vortkategorio, kiu kelkfoje ludas en nia lingvo la saman rolon, kiel la substantivo : tio estas la adjektivo. Ĉe Zamenhof pli ol unufoje oni renkontas adjektivon uzatan kun la funkcio de substantivo : mi citu nur pruve du Zamenhofajn proverbojn : “sata malsatan ne povas kompreni” kaj “prokrastita ne estas perdita,” en kiuj la adjektivoj rilatas al subkomprenata substantivo (“homo” en la unua ekzemplo, “afero” en la dua). Do, sekvante tiun metodon, ni plene rajtus uzadi adjektivan formon por nomi certajn literojn, subkomprenante la vorton “litero” post ili : *bo* = *ba* (litero). Nenio en tio ŝokus, eĉ plej delikate, la Fundamenton.

Ni disponas do du finaĵojn por faciligi la distingon inter la plej facile konfuzebaj konsonantoj. Restas nur difini, kiaj konsonantoj estas tiel konfuzebaj. Facila tasko, se oni utiligas la instruojn de la fonetiko.

La konsonantoj estas klaseblaj en du grandajn kategoriojn, laŭ tio, ĉu ilia prononco estas akompanata aŭ ne de vibrado de la voĉkordoj ; ĉiu estiĝloko naskas efektive du fratajn konsonantojn, unu senvoĉan kaj unu



voĉan. En Esperanto troviĝas jenaj paroj :

senvoĉaj : p, t, k, f, s, ŝ, c, ĉ  
voĉaj : b, d, g, v, z, ĵ, dz, ĝ

Jen do la konsonantoj, kiujn oni devas zorgi distingi unu je la alia. La plej simpla rimedo ŝajnas esti, se oni aldonas la o-finaĵon al la senvoĉaj kaj la a-finaĵon al la voĉaj : *po, ba; to, da*, k.t.p.

Ekster tiu klasado restas la du elspiraj (*h, ĥ*), la kvar likvaj (*l, m, n, r*), kaj la du duonvokaloj (*j, ŭ*) ; la du elspiraj estas ambaŭ senvoĉaj, la ceteraj voĉaj. Tamen estus bezone fari distingon inter ili ankaŭ, ĉar multaj homoj facile konfuzas *mo* kaj *no* (same kiel ili konfuzas *em* kaj *en* en la nacilingvaj alfabetoj kaj en la proponitaj Esperantaj alfabetoj inspiritaj de tiuj) k.t.p. Ĉar ni ne havas por tiuj literoj fonetikan kriterion, ni devos elekti el aliaj motivoj (ekz-e per la prononco *mo* oni ebligus distingon disde la iom najbara lipsono *ba* ; per la prononco *lo* oni evitus konfuzon kun la artikolo, k.t.p.). Ni fine atingas jenan distribuon : *a, ba, co, ĉo, da, e, fo, ga, ĝa, ha, ĥo, i, jo, ĵa, ko, lo, mo, na, o, po, ra, so, ŝo, to, u, ŭo, va, za*. Oni legus do la formulojn : *angulo MNO, frakcio <sup>b</sup>/<sub>p</sub>, <sup>a</sup>/<sub>a</sub>* k.t.p. jene : *angulo mo na o, frakcio ba sur po, a potenco ba* (sekve ankaŭ : *levi nombron je la na potenco* k.t.p.)

Fine ni renkontas la demandon de la literoj fremdaj al nia Esperanta alfabeto, kiujn tamen la specialistoj havas okazon uzadi. Por plia klareco kaj por bone montri, ke temas pri pruntaĵoj, mi emus doni al ili plursilabajn nomojn.

El la latina alfabeto devenas kvar tiaj simboloj : *q, w, x, y*, kiujn mi proponus nomi respektive : *kvo, vavo* (aŭ *duobla va*—sed *vavo* pli similus la

nomon de tiu litero en la origina hebrea alfabeto kaj estus pli oportuna, ol la kunmetita formo), *ikso* kaj *ipsilono* (aŭ *i greka*).

El la greka alfabeto venas multaj literoj, el kiuj oni povus senŝanĝe akcepti tiujn, kiuj finiĝas per -a, kaj provizi la ceterajn per -o. Tiel oni ricevus la tabelon : *alfa, beta, gama, delta, epsilono, zeta, eta, teta, jota, kapa, lamda, muo, nuo, omikrono, pio, ro, sigma, taŭo, upsilono, fio, ĥio, psio, omega* (*taŭo* kaj *upsilono* por distingi ilin de la latinaj *to* kaj *ipsilono*).

Mi kuraĝas opinii, ke la ĉi-supre proponita sistemo kontentigas la du postulojn montritajn en la komenco. Sed ĉu ĝi ankaŭ kontentigos la praktikajn bezonojn kaj la personajn gustojn, mi ne scias. Tial mi tre dezirus, ke la interesatoj bonvolu kelke eksperimenti per ĝi kaj poste esprimi al mi sian opinion.

Valora kaj utila libro por ĉiu estas la nova tute reviziita eldono de

## NAŬLINGVA ETIMOLOGIA LEKSIKONO

de

LOUIS BASTIEN, Akademiano

317 paĝa, bele presita kaj bindita

Prezo 12ŝ. 6p. afranko 6p.

Eldonita de

**The Esperanto Publishing Co. Ltd.,  
Anglujo**

*Mendu ĉe vialanda librovendejo  
aŭ ĉe*

**Universala Esperanto-Asocio,  
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,  
Anglujo**



# ESPERANTO KAJ RADIO

*Mallongigoj :*

I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

|                 |             |                                                                                                          |
|-----------------|-------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| <b>Dimanĉo</b>  | 16.00–16.20 | Roma. 19.5m., 31.1m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.                                    |
| <b>Lundo</b>    | 05.30–05.35 | Wien. 513m., 25m., 30m., 41m., 48m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV.                         |
|                 | 07.15–07.30 | Stockholm. 19.80m., 49.46m. P.                                                                           |
|                 | 07.45–08.00 | Lille. 235m. P. Radiodiffusion Française, Lille (Nord), Francujo.                                        |
|                 | 14.30–15.00 | Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação e Saude, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo. |
|                 | 15.15–15.30 | Stockholm. 19.80m., 27.83m. P. Sveriges Radio, Stockholm 7, Svedlando.                                   |
|                 | 22.15–22.20 | Hilversum. 402m. I. (ĉiun duan lundon). V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.                   |
| <b>Mardo</b>    | 01.15–01.30 | Stockholm. 19.80m., 27.83m. P.                                                                           |
|                 | 11.50–11.55 | Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 28, Bern.                  |
|                 | 17.35–17.40 | Bern. Kiel je 11.50, sed anst. 13.94m., sur 19.60m. (Krom la unua mardo).                                |
|                 | 23.45–24.00 | Gvatemalo. 49m. I. Estación Cultural de la Voz de Guatemala, Guatemala Cd., C. Ameriko.                  |
| <b>Ĵaŭdo</b>    | 08.30–08.45 | Paris. 347m., 48.39m. K.                                                                                 |
|                 | 11.55–12.00 | Bern. Kiel marde. D-ro Privat.                                                                           |
|                 | 17.10–17.25 | Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).                                               |
|                 | 17.35–17.40 | Bern. Kiel marde. D-ro Privat.                                                                           |
| <b>Vendredo</b> | 16.00–16.20 | Roma. Kiel dimanĉe.                                                                                      |
| <b>Sabato</b>   | 20.00–20.15 | Sofia. 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.                                                                |
|                 | 22.15–22.20 | Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.                                        |

**Klarigo**—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

**Noto pri Radio Roma :** Unuan vendredon de la monato : Respondoj al aŭskultantoj pri la *Dia Komedio* de Dante Alighiere kaj aliaj temoj. Duan kaj kvaran vendredojn : Komentado de unuopa kanto de la *Dia Komedio*. Prelegisto : Prof. Vincenzo Musella. Nepre skribu multnombre al ĉi tiu stacio por apogi la elsendojn.



Nia felietono :

# La Alaska Stafeto

F. Omelka

## Antaŭparolo

*A L A S K O—malproksima lando en amerika nordo. Malmilda lando de kruelaj frostoj kaj neĝblovadoj. La lando de longa vintro kaj mallonga somero. La lando de senfinaj kaj dezertaj ebenaĵoj, de ĉielatingaj montoj kaj rabaj fluoj de riveroj. La lando, kiu en la fino de la pasinta jarcento fortege spiregis pro la alfluo de orministoj, kiujn tien allogis febraj fantomoj de oraj vejnoj kaj flave brilantaj montriveretoj. La lando, kiu—kiel neniu alia—estis la atestanto de kapturte rapida kresko de fieraj urboj kaj ilia malgaja bankroto. La lando preskaŭ senhoma, ĉar unu homo—blankulo, Eskimo aŭ Indiano—meze vivas tie sur spaco da 25-kilometra kvadrato . . . .*

*Kaj al tiu ĉi malproksima angulo de nia terglobo estis direktataj antaŭ malmultaj jaroj la okuloj de la tuta mondo. Milionoj da koroj batis pli rapide ol kutime. Tio ne estis sciigo pri iaj novaj trovaĵoj de multekosta metalo, kio vigligis la loĝantojn de ĉiuj regionoj, kien penetris la civilizo. Ne, tio estis io alia. Delikataj koroj estis premataj de doloriga kompato pro la tragedio, per kiu estis trafita la urbo Nome. La tuta mondo kliniĝis en humila respekto kaj senlima admiro antaŭ la heroeco de viroj de la Nordo. En tiuj momentoj, kiam oni perdis la spiron pro ekscitiĝo, multaj homoj ekkonsciis, kiel bele estas—esti homo. Kaj ĉiuj atendis en angora streĉo, ĉu atingos ĝustatempe sian celon—la alaska stafeto.*

## I. Epidemio

Januara vespero 1925.

Malvarma norda vento blovis rekte de la poluso. Ĝi kuregis tra la stratoj de la urbeto Nome kiel furioza ĉevalo. Ĝi fajfis, bruegis, ĝemis. Ĝi kolere atakis dikajn fenestrotabulojn kaj penetris en varmigitajn loĝejojn.

Post la sesa horo la vento ankoraŭ plifortiĝis. Ĝi suprenlevis de sur la tero freŝan neĝon, portis ĝin alten kaj pelis ĝin antaŭ sin. El malproksimo aŭdiĝis malserena bruado de grandegaj glaciblokoj, kiuj puŝis unu la alian, kuniĝis kaj denove rompiĝis, ĝis la tero tremis.

Malgraŭ la malbona vetero, ĉirkaŭ la sepa horo la pordoj de la domoj malfermiĝis kaj en la neĝblovadon eliris gepatroj kun siaj infanoj. Ili apenaŭ transpaŝis la sojlon de la domo, kiam la vento atakis ilin, ĝi ekpikis iliajn vizaĝojn kaj penetris ĝis la ostoj. La irantoj ektremis pro la malvarmo, entiriĝis en siajn peltajn mantelojn, patrinoj altiris al la infanoj ŝalojn kaj iliajn ĉapojn malsuprentiris ĝis la okuloj, sed nenio helpis. La vento haltigis ilin, pikis, sufokis, pelis larĝmojn en la okulojn.

“Terure !” ĝemis plenaĝuloj kaj la infanoj singultis.

Sed neniu revenis hejmen. Ĉiuj rapidis al la hotelo, kies hele lumigitaj fenestroj altiris ilin, kiel per magneta forto.

En la vasta salono de la hotelo estis tre vigle. Antaŭe apud la scenejo

svarmis infanoj. Malantaŭe sidis plenaĝuloj, kiuj ridante observis la svarmadon de siaj infanoj.

“Mi diras al vi, ke fraŭlino Elias devas havi nervojn kiel ŝnurojn, por ebligi al ŝi vivi kun ili tutajn tagojn,” diris maljuna Davison al sia najbarino.

“Mi opinias, ke ŝi jam alkutimiĝis,” respondis la sinjorino.

“Sed tamen . . . . Almenaŭ por mi tio estus super la fortoj.”

“En la lernejo ili certe ne estas tiom sovaĝaj,” defendis la infanojn alia sinjorino. “Sed hodiaŭ—kiu ja mirus? Infana teatraĵo! Nia Tommy jam tutan semajnon parolas pri nenio alia.”

“Vi pravas, sinjorino,” konsentis Davison. “Nia Karlo lernis sian rolon en ĉiu libera momento. Mi mem konas ĝin jam parkere.”

“Kaj la teatraĵo estas versimile tre interesa. El tio, kion mi aŭdis de nia Mary, mi komprenis, ke la teatraĵo prezentas la vivon en nia urbo de la unuaj tempoj de ĝia ekfloro,” daŭrigis la konversacion plua sinjorino.

“Plej multe plaĉis al mi tiu okazintaĵo kun iu orministo,” diris Davison.

“Kiu? Pri tio mi ne aŭdis,” devigis atenton maljuna sinjoro, kiu ĝis tiu momento silentis.

“La afero okazis jene,” ekparolis lia komunikema najbarino. “En la fino de la pasinta jarcento venadis en Alaskon multaj aventuremaj homoj kaj tiuj, kiuj sopiris je oro. Ĵurnaloj skribis pri la riveroj plenaj de oro, pri la fabelaj orŝtonoj, kiuj estas troveblaj je ĉiu paŝo. Ĉu mirinde, ke la homoj alvenadis ĉi tien amase? Nomoj kiaj Yukon, Klondike, Dawson City estis aŭdeblaj de la mateno ĝis la nokto. Ĉiu sciis, ke tiuj nomoj signifas oron kaj riĉecon. Kaj post nelonge oni povis aŭdi nomon novan, kiun pli frue neniu aŭdis. *Nome, Nome* aŭdiĝis el ĉiuj flankoj.”

“Kiamaniere estis tiu nomo kreita?” la maljuna sinjoro interrompis la rakontantan virinon.

“Tion mi scias el la rolo de nia Karlo,” klarigis kompleze sinjoro Davison. “Kiam oni eksciis pri la nova regiono plena de oro, ĉiu orministo sciis, ke tiu ĉi regiono troviĝas en la ekstrema okcidento de Alasko, proksime de Behringmarkolo kaj do jam malproksime de la polusa cirklo. Sed se iu demandis, kiel la loko nomiĝas, neniu tion sciis. Oni diris, ke la regiono estas sen nomo—*no name*.\* La esprimon *no name* mallongigis la orministoj je *Nome* kaj tiu ĉi nomo jam restas por nia urbo.”

“Tio estas tre interesa,” kapjesis maljuna sinjoro. “Kaj kio okazis poste, sinjorino?” li turnis sin denove al sia najbarino.

“En la urbon Nome venadis la orministoj amase. Plej multaj el ili serĉis la valoran metalon individue, sed post sia laboro ili kunvenadis kaj amuziĝis kune. Nur unu neniam vizitis iliajn rondojn. Li loĝis sola en ligna barako, li sola laboris, li sola sin nutris. Neniu sciis, kiel li fartas, kaj iom post iom oni perdis intereson pri li. Atenton de la orministoj li vekis nur tiam, kiam li en kelkaj sinsekvaj tagoj ne estis videbla en sia laborloko. Kio

\* anglalingvaj vortoj = *neniu nomo*.



okazis al Sam?—oni demandis unu al alian. Neniu sciis. Kiam li ne estis videbla ankaŭ en la sekvantaj tagoj, orministoj eniris lian barakon. Kaj tie ili ekvidis malgajan spektaklon.”

“Kion?”

“Sam kuŝis en la lito, mortinta. Ili tuj divenis, ke li mortis elĉerpita pro la malsato. La afero estis des pli tragika pro tio, ke apud li kuŝis kelkaj saketoj kaj en ili la plej belaj orpecoj . . . .”

“Do Sam estis riĉegulo?”

“Li povus esti, se li estus sukcesinta forveturigi la oron en civilizitan mondon. Ĉi tie la tuta riĉaĵo havis por li neniun valoron. Li mortis de malsato, kiel la plej malfeliĉa malriĉulo.”

“Ĝi estis vera tragedio,” diris enpense juna ĵurnalisto Hilton, kiu venis en Nome nur por scii, kiel aspektas arkta vintro. “Tiamaniere morti sur la sojlo de sia feliĉo, tio estas iom kruela.”

“Jes,” konsentis Davison. “Kaj oni rakontas, ke similaj aferoj okazis ĉi tie pli ofte. Sed tio estas jam pasinta historio. Hodiaŭ—”

“Hodiaŭ ni aŭskultas tion, kiel fabelon,” rimarkigis sinjorino Hastings. “Kaj la infanoj, kiuj hodiaŭ ludos aŭ rigardos la teatraĵon, certe opinios, ke ĝi estas fabela de la komenco ĝis la fino.”

“Fraŭlino Elias certe havis malfacilan laboron, kiam ŝi verkis la teatraĵon.”

“Ni havas lertan instruistinon. Estas ĝojo rigardi ŝin, kiam ŝi parolas kun la infanoj. Ĉiuj geknaboj estas en siajn rolojn enamiĝintaj.”

“Kaj kiom malfeliĉaj estis tiuj, kiuj ne ludos!”

“Mi volus vidi, kiel fieraj ili estos, se la hodiaŭa vespero sukcesos.”

“Kaj la publiko komencas jam esti malpacienca, rigardu!”

Vere! En la salono aŭdiĝis aplaŭdo. Komence ĝi estis nur malkuraĝa—ja nur kelkaj plej kuraĝaj knaboj aplaŭdis kvazaŭ ili provus, kion diros pri tio maturaj homoj. Sed kiam ili ekvidis nur indulgemajn ridetojn, en kiuj kuŝis la sincera kompreno por infana malpacienco, la salono ektondris per plifortigita aplaŭdo kaj laŭtaj krioj.

Subite eksonis sonorilo. En tiu momento la malpaciencaj infanoj trankviliĝis kaj streĉe rigardis al la scenejo.

Sed la kurteno restis mallevita. Nur pli vigla vivo malantaŭ ĝi malkaŝis, ke tie oni finas la lastajn preparojn por la granda debuto.

Ĵus eniris la salonon kuracisto Welch kun sia dektrijara knabo Georgo. Ĉiuj ĝentile salutis la estimatan viron, kies kapableco kaj lerteco estis bone konataj.

La kuracisto kun afabla rideto respondis la salutojn kaj sidiĝis kun la civitanoj. Georgo iris inter la geknabojn.

“Ni jam timis, ke ni venos malfrue,” diris la kuracisto. “Sed, kiel mi vidas, la komenco estas prokrastita.”

“La infanoj jam ribelas,” sinjorino Hastings rigardis al la unuaj benkoj.

“Kiu povus miri !” ridetis la kuracisto. “Ĉu ni kondukis alie, kiam ni estis junaj ?”

Post nova tondra aplaŭdo aŭdiĝis la akra voĉo de sonorilo. Kaj en la trankviliĝintan salonon penetris el la scenejo konfuzitaj ekkrioj :

“Kie estas Roberto ? Kio okazis al li ? Ĉu vi ne vidis lin ?”

“Kaj kie restas Karlo ?” koleris fraŭlino Elias. “Ili faris tion belege ! La publiko estas jam malpacienca kaj la aktoroj restas hejme !”

“Sinjorino instruistino, mi venigos ilin !” proponis iu knabo.

“La ventego vin forportus—ĉu vi ne aŭdas, kiel ĝi tondras ? Sed . . . . ne gravas, infanoj ! Kelkajn momentojn min atendu, mi mem venigos ilin.”

Kaj la instruistino rapide foriris.

“Se tio estus iu alia . . . . ! koleretis ĉarme vestita knabineto. “Sed ĝuste Roberto, kiu ludas la ĉefan rolon !”

“Kaj sen Karlo ni ankaŭ ne povas ludi,” aliĝis knaba voĉo.

Dume la malpacienco ĉiam kreskis. La infanoj sidantaj sur la unuaj benkoj ekaŭdis, ke Roberto kaj Karlo ne alvenis, kaj la neatendita sciigo rapide disvastiĝis tra la tuta salono.

“Ĉu vi ne scias, kial ili ne alvenis ? Kio retenis ilin ? Eble ili forgesis, ke oni ludas hodiaŭ !”

Panikaj demandoj flugis laŭ la salono. Neniu scipovis respondi ilin. Ĉiuj akorde interkonsentis, ke ili estas malordemaj lernantoj kaj oni devus puni ilin.

Kiam la koleriĝo kontraŭ la malakurataj knaboj kulminis, antaŭ la kurteno aperis la instruistino. Momente ĉiuj silentiĝis kaj rigardis ŝian ekscititan vizaĝon.

“Estimataj ĉeestantoj ! Kun granda bedaŭro mi devas komuniki al vi, ke la teatroludon, pri kiu ni ĉiuj tiom ĝojis, ni ne povas hodiaŭ efektivigi.”

“Kial ?” elspiris trompigite ĉiuj infanoj.

“Ĉar Roberto kaj Karlo, kiuj ludas ĉefajn rolojn, subite ekmalsanis,” diris rapide la instruistino kaj estis feliĉa, ke ŝi jam plenumis sian malagrablan taskon. “La enirbiletojn bonvolu teni. Ni ludos la teatraĵon kiam ambaŭ knaboj resaniĝos.”

Tio estis dirita klare, sed tamen neniu leviĝis. Ĉiuj bedaŭris, ke la afero tiel malfeliĉe malsukcesis. La infanoj preskaŭ ploris. Ili ja tiom ĝojis je la hodiaŭa tago !

Fine ekparolis Davison :

“Nu, kion fari ! Almenaŭ restos al ni ĝojo post kelkaj pluaj tagoj. Kaj ĉu vi ne scias, sinjoro doktoro, kio okazis al ili ?” li turnis sin al kuracisto Welch.

“Mi ne scias. Neniu vizitis min. Eble ia malvarmumiĝo. Infano elkuras el la varma hejmo malbone vestita—”



Li ankoraŭ ne finparolis, kiam aperis en la pordo la patrino de Karlo.

“Mi petas vin, ĉu estas ĉi tie sinjoro doktoro Welch?” ŝi ekscitite demandis kelkajn homojn, kiuj jam volis forlasi la salonon.

“Jes, tie—,” ili montris en la mezon de la salono.

Doktoro Welch iris al ŝi renkonten.

“Kio okazis, sinjorino Brown?”

“Mi venas rekte de via domo, sinjoro doktoro. Via edzino diris al mi, ke vi estas ĉi tie. Nia Karlo subite malsaniĝis,” ŝi komunikis rapide, ekscitite.

“Eble la malsano ne estas tre malbona. Kio okazis al li?”

“Mi ne scias. Hieraŭ li kuradis kiel sovaĝulo, kaj hodiaŭ li nur brulas. Mi opiniis, ke pro la ekscitiĝo pri la hodiaŭa teatraĵo. Li ja tiom ĝojis je tio—sed vespere li komencis vomi, li ekhavis febron kaj nun li plendas, ke li sentas dolorojn en la gorgo. Mi tiom timas, sinjoro doktoro!”

“Mi tuj vizitos vin. Sed unue mi devas iri hejmen por la kofreto,” diris la kuracisto kaj li rapidis al la elirejo.

En la pordo li renkontis la patrinon de Roberto.

“Sinjoro doktoro, mi petas vin, venu rigardi nian Roberton!”

Denove la sama afero. Hieraŭ ĉio estis en ordo, kaj hodiaŭ vomado, febro, gorgo.

Homoj, kiuj ĉion aŭdis, maltrankviliĝis. Kion tio signifas? Kio trafis la infanojn en Nome?

La salono rapide malpleniĝis. Neniu jam pensis pri la teatraĵo. Ĉiuj pensoj estis direktitaj al la malsano, kiu tiom neatendite aperis.

Doktoro Welch vizitis ambaŭ pacientojn, funde trarigardis ilin, donis al ili injektojn kaj diris, ke morgaŭ matene li venos denove. Je la demandoj, pri kiu malsano temas, li respondis elturniĝeme.

Kaj kiam li revenis hejmen, atendis lin tie ankoraŭ du virinoj. Li estu tiel afabla kaj iru al iliaj infanoj . . . .

Post la dudekdua horo li revenis. Sinjorino Welch atendis lin malpacience.

“Kio okazis tiom subite?” ŝi demandis.

“Difterio,” diris la kuracisto malrapide kaj peze li sidiĝis en la fotelon.

“Ĉe ĉiuj kvar?”

“Jes. Kaj mi timas, ke ili ne restos solaj. Almenaŭ oni diris al mi, ke en ankoraŭ kelkaj domoj estas malsanaj infanoj.”

“Ĉu vi havas sufiĉe da kontraŭ-difteria sero?”

“Jes, mi havas, sed . . . sed mi timas—”

“Kion?”

“Mi timas, ke ĝi estas jam tro malnova kaj efikos nur malforte.”

“Ho!”

“Mi ne kulpas pri tio. Novan mendon mi faris somere, kiel mi faras ĉiujare. Eble ĝi survoje perdiĝis, eble la ŝipo ne povis veturi pluen—kaj nun—”

“Kion nun?” ripetis lian vorton la paliĝinta sinjorino.

“La seron mi devas havi je ĉiu prezo!”

“Sed kiamaniere vi povas ĝin akiri? La plej proksima bakteriologia instituto estas en Seattle, tio signifas distancon de kvin mil kilometroj—kaj vi devas ĝin havi tre baldaŭ, tre rapide, ĉu ne?”

“Jes, tre rapide. Ĉar se eksplodos epidemio ĉi tie en la nordo, tiam ĝi estas multe pli kruda ol en civilizitaj regionoj. Se estus somero, oni alveturigus la seron per aviadilo. Sed nun—en tiu ĉi terura vintro—”

En la ĉambro regis profunda silento.

La kuracisto subite leviĝis.

“Kien vi volas iri?” demandis lin sinjorino Welch.

“Al la poŝtoŝtelo. Mi faros ĉion, kio estos en miaj fortoj.”

Li surmetis pezan pelton kaj eliris en la bruantan ventegon.

(daŭrigota)



## KIO ESTAS VIA V-K.?

(respondoj sur p. 32)

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Bijenhofstr. 34, Leeuwarden, Nederlando.

Divenu la ĝustajn el la signifoj donitaj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu malselekto aŭ nescio.

**1. Rezigni** : (a) kontraŭstari, (b) ekŝiĝi el ofico, (c) tute forlasi deziron, celon?

**2. Skeptika** : (a) inklina al dubo, (b) plenfida, (c) senespera?

**3. Stagni** : (a) restadi senflua, (b) haltigi, (c) stan(um)i?

**4. Inerta** : (a) melankolia, (b) maliniciatema, (c) senzorga?

**5. Fenomeno** : (a) varma suda vento, (b) natura okazaĵo, (c) kemia elemento?

**6. Kongrui** : (a) kontraŭdiri, (b) maltaŭgi, (c) esti konforma kun?

**7. Unika** : (a) taŭga por ĉio, (b) hermafrodita (duseksa), (c) sola en sia speco?

**8. Platona** : (a) praktike neefektiva, (b) senreliefa, (c) aproba?

**9. Superstiĉo** : (a) kredo je absurdaj misteraĵoj, (b) facilkredemo, (c) kreskaĵo?

**10. Ekzalti** : (a) esti pli bona ol, (b) laŭdegi, (c) tre eksciti la imagon?

## I.A.P.K.

Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj sciigas, ke la sidejo provizore transiris al Svedlando. Dum 1951 ne aperos la organo *Internacia Poŝtmarka Revuo*, sed la servojn de la Asocio oni daŭrigos pere de la sveda centro. Por ĉiuj informoj oni sin turnu al: Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj, Box 5085, Göteborg 5, Svedlando.



# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

## OFICIALA INFORMILO

N-ro 233

1-an Decembron 1950

**DELEGITOJ.** Informo pri la multaj aldonoj kaj ŝanĝoj aperos en la jarlibro, kiun ni esperas dissendi en Januaro.

### NOVA DUMVIVA MEMBRO

Schweizer, S-ro A., Zürich, Svislando

### PATRONOJ 1951

1. Williams, D-ro F. J., Melbourne, Aŭstralio
2. Wooding, S-ro N., Leicester, Anglujo
3. Ravestein, S-ino J. M., Den Haag, Ned.
4. Crowley, D-ro R. H., Tewin, Anglujo
5. Gueritte, S-ro T. J., Surbiton, Anglujo

### MEMBRO-SUBTENANTO 1951

1. Pfanner, S-ro J. R., Gandorhun, Sieraleono
2. Vugrinec, D-ro Z., Slav. Požega, Jugosl.
3. Collier, S-ro J., Westgate-on-Sea, Angl.
4. Serra, S-ro P., Aveiro, Portugalujo
5. Alberich-Jofre, S-ro S., Barcelona, Hisp.
6. Bemaldo, S-ro L., Lisboa, Portugalujo
7. Roome, S-ro G. W., Sheffield, Anglujo
8. Baaten, S-ro W., Utrecht, Nederlando
9. Ouwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando
10. Bohren, Prof. A., Thun, Svislando
11. Hattemer, S-ro H., Solothurn, Svisl.
12. Jayet, F-ino E., Morges, Svislando
13. Jost, S-ro K., Zürich, Svislando
14. Le Brun, S-ro P., Kreuzlingen, Svisl.
15. Monod, F-ino H., Morges, Svislando
16. Deane, F-ino L. M., Broadstone, Anglujo
17. Avoth, S-ro J., Porto, Portugalujo
18. Tudela Flores, S-ro E., Valencia, Hisp.
19. Kempeneers, D-ro P., Bruxelles, Belgujo
20. Staes, S-ino F., Bruxelles, Belgujo
21. Baur, D-ro A., Liebefeld, Svislando
22. Gigandet, S-ino R., Solothurn, Svisl.
23. Persson, S-ro G., Astorp, Svedujo

24. Apcher, S-ro L., Meknés, Maroko
25. Knecht, S-ro F., Casablanca, Maroko
26. Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo
27. Hehir, S-ro C. P., Kalgoorlie, Aŭstralio
28. Alexander, S-ro K., New Malden, Anglujo
29. Baillie, S-ro T. C., Worksop, Anglujo
30. Bevan, S-ro F. O., Farnborough, Anglujo
31. Bluett, S-ro T. L. C., London, Anglujo
32. Chambers, S-ro J. W., Parkstone, Anglujo
33. Fisher, S-ro A., Parkstone, Anglujo
34. Fotherby, F-ino A., Surbiton, Anglujo
35. Fuller, S-ro S. T., Brighton, Anglujo
36. Gillett, S-ro R. B., Andover, Anglujo
37. Goodfellow, S-ino V., Whitburn, Anglujo
38. Hilder, S-ro E. C., Torrington, Anglujo
39. Jay, F-ino M., Bishop Auckland, Anglujo
40. Knight, S-ro F. E., Dorchester, Anglujo
41. Miller, S-ro J. R., Stone, Anglujo
42. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Anglujo
43. Pearson, S-ro M., Sheffield, Anglujo
44. Shaw, S-ro F. W., Whitworth, Anglujo
45. Thurgood, S-ro F., London, Anglujo
46. Willan, S-ro F., Clayton-le-Dale, Angl.
47. Geerinck, S-ro R., St. Niklaas, Belgujo
48. Karlsson, F-ino H., Klippan, Svedujo
49. Linder, S-ro C. H., Stockholm, Svedujo
50. Nilsson, S-ro N. G., Göteborg, Svedujo
51. Svensson, S-ro I., Örebro, Svedujo
52. Geers, F-ino B., Heide-Kalmthout, Belg.
53. Van Gindertaelen, D-ro T., Mechelen, Belg.
54. Magotteaux, S-ro L., Liège, Belgujo
55. Lopes do Rego, S-ro M., Lisboa, Port.
56. Bugge-Paulsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo

**DONACOJ.** H. T. Bailey 7ŝ. 6p., Klubo de I.K.B. 6ŝ., F. E. Knight 6ŝ., E. B. Johnson 7ŝ. 6p., D. Toro 3ŝ. 6p.

**Sinceran dankon al ĉiu helpanto**

**STATISTIKO.** Jen la stato de la membraro je la 30a de Novembro 1950, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Novembro 1949:

|                     | 1949  | 1950  |
|---------------------|-------|-------|
| Asociaj membroj     | 7878  | 8595  |
| Individuaj membroj: |       |       |
| MJ .. .. .          | 851   | 877   |
| MA .. .. .          | 4372  | 4256  |
| MS .. .. .          | 364   | 288   |
| Patronoj ..         | 17    | 15    |
| DM .. .. .          | 189   | 209   |
| HM .. .. .          | 60    | 59    |
|                     | 5853  | 5704  |
|                     | 13731 | 14299 |

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario*.

## KIO ESTAS VIA V-K. ?

(vidu p. 30)

### Respondoj

1. (c) **Rezigni** signifas tute forlasi ian deziron, celon k.s.
2. (a) **Skeptika** signifas inklini al dubo.
3. (a) **Stagni** signifas restadi senflua.
4. (b) **Inerta** signifas maliniciatema, senenergia.
5. (b) **Fenomeno** estas natura okazaĵo.
6. (c) **Kongrui** signifas esti konforma kun.
7. (c) **Unika** signifas sola en sia speco.
8. (a) **Platona** signifas praktike neefektiva.
9. (a) **Superstiĉo** estas kredo je absurdaj misteraĵoj.
10. (c) **Ekzalti** signifas tre eksciti la imagon aŭ la sentojn.

## NIAJ MORTINTOJ

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

**Grau Casas**, S-ro Jaume, mortis 8 nov. 1950 en Valencia, Hispanujo. Kataluno nask. 2 dec. 1896 en Barcelona. Esperantisto kaj aktiva propagandisto de 1914. En 1920-24 direktoro de *Kataluna Esperantisto*. Verkis multajn artikolojn kaj versaĵojn aperintajn en *K.E.*, *Literatura Mondo*, *Heroldo de Esp.* k.a. Verkis jenajn: *Amaj Poemoj* 1924, *Novaj Amaj Poemoj* 1927, *La Lasta Poemo* 1936, *La Kataluna Popolkanto* 1925 (en kunlaboro kun Joan Amadas), *Barbaraj Prozaĵoj* 1926 (trad.), *Kataluna Antologio* (kiel ĉefa kompilinto). Lasis post sia morto multajn manuskriptojn inter kiuj *Hispana Antologio*. Elektita L.K.-ano en 1926, poste Akademiano. Dum kelkaj jaroj Vicprez. de la Akademio.

**Osterberg** S-ro Erik, Del. de U.E.A. en Härnösand, 16 aŭg. 1950, 69-jara.

**Rattenborg** S-ino Anne, FD de U.E.A. en Aarhus, Danlando, nov. 1950, 73-jara.

**Shaw** S-ro Harry, en Swanick, Anglujo, 21 nov. 1950, post kormalsano. Malavara subtenanto de U.E.A.

**Soloviev**, S-ro Miĥaelo, D. en Cavtat, Jugoslavujo, 8 nov. 1950, 76-jara. Nask. en Odessa kaj aktive laboris por nia afero jam de 1889, en kiu jaro li verkis sian unuan versaĵon *Akcipitro kaj Falko* (*Esperantisto* 1891). Poemoj liaj troviĝas en *Fundamenta Krestomatio*. En la *Adresaro* portis numeron 411. Detala biografieto troviĝas en *Esperanto* (nov. 1949). Altaj instancoj estis reprezentataj ĉe la funebra ceremonio kaj la tuta komunumo Cavtat honoris per sia ĉeesto distingitan homon.

**Manuel Sanchez**, Tordera 24, Barcelona, Hispanujo deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. tutmonde.

**La Esperanta Murkalendaro** estas propagandilo daŭranta la tutan jaron. Kiel en la pasintaj jaroj ĝi estas eldonota por 1951. (Kosto: 4 respondkuponoj). Senprokraste mendu ĝin ĉe S-ro Bourguignon, en Lannemezan (H.P.), Francujo.

**Korespondon deziras** kun ĉiuj landoj s-ino Linda Nieminen, Pengerkatu 22 A 13, Helsinki, Finnlando.

**100 kursanoj** de s-ino M. C. Major (13-55 jaraj, geliceanoj kaj diversmetiuloj) deziras korespondi per p. il. Adr. (nur !) Somero, Finnlando.



# ANONCETOJ

*Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.*

**Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.**

**Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.**

**Norvegujo.** Ĉefkuracisto (hirurgo), hejmslojdestro, radioprograma sekretario, junaj flugistoj kaj maristoj, telegrafistoj, presisto, stenografistino, frizistino, gevendistoj, gekontoristoj, gelaboristoj, junaj mastrinoj kaj gelernantoj, entute 40. Cseh-metodaj kursanoj de T. Morariu, en Tromsø, 21° de la Norda Poluso, deziras korespondadi kun ĉiuj landoj. Respondon garantias Esperanto-Klubo, Tromsø, p. adr. Bakisto Rolf Holm, Tromsø, Norvegujo.

**Por 5 respondkup.** mi sendas b. poŝtm ; por 3 rpk. du gaz. il ; Karlo Schmäuder, Im Hag 6, Stuttgart-Untertürkheim, U.S. Zone, Germanujo.

**Martin Marmeborg,** Box 2207, Grängesberg, Svedujo, 38-jara oficisto, deziras korespondi kun Nederlando, Francujo, Svisujo, Islando, Nord- kaj Sud-Ameriko, Nov-Zelando, Sud-Afriko pri ĉiaj temoj, escepte de religio.

**22-jara fraŭlino** deziras korespondi tutmonde : Anĝelka Malivuk, Miŝkinova 58, Zagreb, Jugoslavujo.

**Salutvesperon internacian** aranĝos Klubo Esperantista de Malmö, Kamrergaten 3, Malmö, Svedujo, en aprilo 1951. Bildkarto, ne leteroj, jam nun danke akceptataj. Afranku filatele. Respondo garantiata.

**Letervespero 1951,** Esperanto-Kongreso, 6 rue Loup, Rouen (Seine-Inf.), Francujo.

**Gekursanoj deziras korespondi** kun tuta mondo : Policisto Lamauve, 37 rue-Casino, Fécamp (Seine-Inf.), Francujo.

**Deziras korespondi** kun samideaninoj en la tutmondo per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj ; respondo garantiata ; Robert Mazade (25-jara), 27 rue Armillerie, Romans (Drôme), Francujo.

**S-ro Jiri Bilek,** Vojice 29, P. Ujezd Podhorni, Ĉeĥoslovakujo, studento, volas korespondi kaj interŝanĝi pm. kaj pk. Respondo certa.

**AAAAAAAAAlt !** Legu Jarlibron pĝ. 55.

**La Kvakera Mesaĝo** pri la Krista lumo interna en la koroj de ĉiuj homoj ĉie ajn. Du libretoj haveblaj kontraŭ unu respondkupono, ĉe G. B. Tordoff, 82 Pendennis Park, Bristol 4, Anglujo (Kvakera Esperantista Societo).

**Antonio Pastor,** Ercilla 43. 5, Bilbao, Hispanujo, deziras interŝanĝi il. pk. kun ĉiuj landoj. Ĉiam respondas.

**Internacia Komerca Servo :** Belga peranto : Konijnenperken 109, Bosvoorde, Belgujo.

**Nekatolikoj,** kiuj deziras informojn pri la katolika religio povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Sekr. Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

**Irlando !** La Esperanto-klubo, 31 North Frederick St., Dublin, aranĝos letervesperon 6-2-1951, kaj invitas korespondadon pri interŝanĝo de bildkarto, poŝtmarkkolektado, sporto kaj progresinta Esperanto.

**Prestwich Esperanto-Societo** okazigos letervesperon Marton 12an 1951 kaj invitas Esperantistojn ĉiulandajn sendi korespondaĵojn k.t.p. Oni nepre respondos. Sekretariino Agnes Dean, "Nia Hejmo", 67 Butterstile Lane, Prestwich, Nr. Manchester, Anglujo.

**Deziras korespondadon** pri fako de komerc-reprezentanto Fernand Stevens, Georges Benoidtlaan 12, Bosvoorde-Brussel, Belgujo.

**Esperantistaj trobadoroj** aranĝas kant-vesperon eksterlande (gitaroj, citroj) kaj paroladon kun filmoj pri Belgujo. Direkcio : Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo.

**Sendas varojn ĉiulanden :** nutraĵon k.t.p. (rk.=afranku filatele), Internacia Esperanto-Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde-Brussel, Belgujo.

**Aro da junaj samideanoj** deziras korespondi kun la tuta mondo pri ĉiaj temoj. Nepre respondos. Skribu al José Marqués, R. Miguel Pais 88 r/c, Barreiro, Portugalujo.

**Hispana Esperanto-Kongreso** en Tarrasa, Aŭgusto 1951. Ni aranĝas okaze de Kongreso, gravan Ekspozicion. Bonvolu sendi materialon : afiŝojn, librojn, broŝurojn, salutkartojn (prefereble bildflanke afrankitajn), leterojn k.t.p. Ni respondos al ĉiuj. Sendaĵojn al Esperanto-Fako, S. Francisco 52, Tarrasa (Barcelona), Hispanujo.

**Tri flegistinoj** deziras korespondi per p. il. kun ĉiuj landoj. F-inoj Anu Mikkola, Elvi Huttunen kaj Pirkko Söderström, adr : Sairaala, Outokumpu, Finnlando.

# LITERATURO

|                                                                                              |               | <i>Neder-<br/>landa<br/>mono</i> | <i>angla<br/>mono</i> |
|----------------------------------------------------------------------------------------------|---------------|----------------------------------|-----------------------|
|                                                                                              |               | fl.                              | ŝ. p.                 |
| <b>La Neĝulino</b> kaj aliaj fabeloj de la fratoj Grimm (Kabe). kart.                        |               | 1.25                             | 3 6                   |
| <b>La nevenkebla ĝeno.</b> Th. Thijssen (Faulhaber). bind.                                   |               | 4.90                             | 9 6                   |
| <b>Judoj sen mono.</b> Michael Gold (Saville). bind. . . . .                                 |               | 2.50                             | 6 0                   |
| <b>La Lanternisto</b> kaj aliaj prozaĵoj. H. Sienkiewicz (Kabe). bind.                       |               | 2.50                             | 6 0                   |
| <b>La vojoj estas nekonataj.</b> L. Kassák (Spierer). bind. . .                              |               | 2.50                             | 6 0                   |
| <b>Skizoj pri Nederlando,</b> kun ilustraĵoj de la aŭtoro. K. Čapek<br>(Degenkamp) . . . . . |               | 1.75                             | 4 0                   |
| <b>Saltego trans jarmiloj.</b> Jean Forge. tole bind. . . . .                                |               | 1.75                             | 4 0                   |
| <b>Du majstronoveloj.</b> Th. Storm. (H. Heutmüller). tole bind.                             |               | 1.75                             | 4 0                   |
| <b>La nekonata konato.</b> D. Boatman. tole bind. . . . .                                    |               | 1.75                             | 4 0                   |
| Baldau aperos: <b>La mondo ne havas atendejon:</b> teatraĵo de<br>Maurits Dekker. . . . .    | prezo fiksota |                                  |                       |

## INSTRUAJ VERKOJ

|                                                                                                          |      |     |
|----------------------------------------------------------------------------------------------------------|------|-----|
| <b>Esperanto 60-jara.</b> G. J. Degenkamp. Pri la evoluo de la<br>lingvo en la literaturo. kart. . . . . | 1.75 | 4 0 |
| <b>Gvidilo tra la Esperanto-movado.</b> G. P. de Bruin . . . . .                                         | 0.95 | 2 6 |
| <b>La unuaj paŝoj en nova mondo.</b> A. Rebers. 5 kajeroj ilustritaj.<br>kune. . . . .                   | 0.75 | 2 0 |

Krome, livereblaj pluraj instruaj Esp.-verkoj en nederlanda lingvo.

|                                                                                                      |      |     |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------|------|-----|
| <b>Ni kantu kaj deklamu!</b> kolekto da 91 kantoj kaj 16 deklamoj                                    | 1.00 | 2 3 |
| <b>Esperanto parolata.</b> Emajlita pordoŝildo kun verda stelo kaj<br>"Esperanto parolata" . . . . . | 0.65 | 1 6 |

Pri la ampleksa stoko da Esperanta literaturo petu senpagan katalogon ĉe  
**LIBROSERVO F. L. E., Roelantstraat 4, Amsterdam-W., Nederlando**

Sendkostoj pagotaj de la mendinto. Ĉe antaŭpago oni aldonu 10%

Ĉiujn librojn ĉi supre menciitajn ! as ankaŭ :

**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
**HERONSGATE, RICKMANSWORTH, HERTS., ANGLUJO**

